# INTERNACIA JURA REVUO

B·U·D·A·P·E·S·T

# I N T E R N A C I A   J U R A   R E V U O

oficiala organo de la Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj

---------------

I-a Jaro    N-ro 1.                    Oktobro-Decembro 1966

Redaktoro:

Dro Lajos Márton

B u d a p e s t

# E N H A V O

Al la leganto

Dro Lajos Márton /Hungarujo/
Evoluo de la familia juro

Ernest I. Goulding /Britujo/
La principo de la Egalrajteco de seksoj en la familia juro angla.

Genĉo Genĉev /Bulgarujo/
La principo de Egalrajteco de ambaŭ seksoj laŭ la bulgara familia juro.

Dro Ludwig Röll /Germana Federacia Respubliko/
La principo de Egalrajteco de seksoj en la familia juro de la Federacia Respubliko Germanujo.

Dro Bálint Szemenyei /Hungarujo/
La principoj de Egalrajteco de seksoj en la familia juro de Hungarlando.

Dro Umberto Stoppoloni /Italujo/
La principo de Egalrajteco de seksoj en la familia juro de Italio.

Prof.Dro Ivo Lapenna /Britujo/
La principo de Egalrajteco de seksoj en la familia juro de Sovetunio kaj Jugoslavio.

Tom Arbe Høeg /Norvegujo/
La principo de Egalrajteco de seksoj en la familia juro de Norvegujo.

Stanislaw Kubiak /Pollando/
La principo de Egalrajteco de seksoj en la familia juro de Pollando.

Prof.Doni Vernescu /Rumanujo/
La principo de Egalrajteco de seksoj en la familia juro de Rumanujo.

## A L   L A   L E G A N T O

Jen estas unuafoje en via mano prijura revuo en la Internacia Lingvo.

"INTERNACIA JURA REVUO" estis fondita dum la 51-a Universala Kongreso de Esperanto en Budapest, kiel organo de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj. /IEAJ/

Nova internacia organo aperas sur la horizonto de la internacia esperanto-movado, kiu klopodas riĉigi la fakliteraturon de la Internacia Lingvo. Ĝia internacieco estas garantiita per la diverslandaj juristo-verkantoj, kaj per ilia helpo ĝia altnivela enhavo.

La apero de esperantlingva "INTERNACIA JURA REVUO" malfermas novan epokon koncerne la utiligon de la Internacia Lingvo en la praktiko. Ja tiu ĉi revuo ne estas unue poresperanta publikaĵo, kaj due ne por la laika publiko, sed male estas destinata al profesiaj juristoj-esperantistoj, kiuj povas ĉerpi el ĝi altnivelajn, utilajn artikolojn, originalajn studojn aŭ tradukitajn fakajn traktaĵojn.

La organo de IEAJ celas disvastigi la Internacian Lingvon inter la juristoj kaj profiti la Internacian Lingvon por fakaj, profesiaj kaj sciencaj celoj de la juristoj, krome antaŭenigi ĝian praktikan uzadon en internaciaj rilatoj. La organo mem celas helpi ankaŭ la evoluigon de la jura esperanto-lingvo kaj tiun de la jura erudicio.

La menciitaj celoj estas sufiĉe vastaj. La enhavo de ĉiu numero espereble povas interesi la tutmondan esperantistan juristan publikon ĉu la teoriulon, ĉu la praktikantojn, eĉ la laikan publikon.

Depende la varia, interesa enhavo, de la kunlaborantoj, ni invitas la membrojn de IEAJ kaj ankaŭ la legantojn al la aktiva kooperado.

La Redaktoro

# EVOLUO DE LA FAMILIA JURO

Kondiĉo de ĉiu homa ekzistado estas la kontentigo de vivbezonoj de la homo /manĝado, trinkado, loĝejo, vestaĵo ktp/. Dua bazfakto konekse kun la homa ekzistado estas, ke la agado de kontentigita bezono kaj la jam akirita rimedo de la kontentigo igas novajn bezonojn. Tria baza interrilato devenas el tiu fakto, ke la homoj, kiuj siajn vivojn reproduktas, ankaŭ plimultiĝas. La produkto de la vivo, ĉu sia vivo, ĉu vivo de la idoj, jam ĉe komenco ŝajnas esti duopa interrilato, parte natura, parte socia rilatoj tiome, se ĉi tiun ni komprenas kiel kunagadon de pluraj individuoj, independe, ke kiamaniere kaj pro kio ĝi okazas.

Ĉe komenco la familio estas unusola, socia rilato. Poste kiam la plimultigitaj bezonoj homaj igus novajn sociajn rilatojn kaj la plimultigitaj homoj kreas novajn bezonojn, tiam okazas ŝanĝo en rolo kaj signifo de la familio. La socian organizaĵon, en kiu vivas homoj de historia epoko kaj lando, difinas la evolua grado, parte de laboro, parte de familio. Ju malpli evoluita estas la laboro kaj kvanto de ĝia produktaĵo, do ankaŭ la havaĵo de la socio, despli ŝajnas esti superega la regado de la familio, la ligilo de parencaro en la socia ordo. Kun la pliiĝo de produktáveco kune evoluas la privata proprietaĵo kaj la interŝanĝo, pliiĝas la proprietaĵ-diferencoj, la utiligebleco de fremda laborforto.

Tiuj-ĉi ŝanĝoj aperas kiel novaj sociaj elementoj dum la historio kaj dum generacioj la homo klopodas la malnovan, sur la familia ligilo baziĝintan nacian, socian strukturon transformigi al la pli evoluinta produktaj interrilatoj, dum fine ilia neakordigebleco igas tian transformiĝon, ke anstataŭ surparenca federacio igas nova socio, kiun koncentras mem la ŝtato.

Sociaj reguloj de la interseksa rilato kaj interna vivo de la gentoj jam antaŭ la elformiĝo de la ŝtato transiris longan evoluon. Ilia ne-sensignifa parto post la kreiĝo de la ŝtato ne estiĝis juraj reguloj, sed kiel sociaj reguloj sen puniga konsekvenco plu efikis. Tiel okazis en antikva Roma, kie la malpermeso pri geedziĝo interne de gento, ne estiĝis jura regulo, sed ekzistas dokumentoj, ke tiun-ĉi malpermeson oni ĝisfine observis. La ŝtato, el la sociaj reguloj pri seksaj interrilatoj, nur tiujn levis al jura regulo, kiujn ĝi bezonis. Absolute estis sufiĉe, ke la geedziĝo kaj la interrilato de apartenintoj al unu familio, estiĝu jura institucio.

La sistemo de juraj reguloj koncernaj al geedziĝo kaj familio, adaptiĝis al interrilatoj de sinsekvaj socioj kaj esence transformiĝis en kadro de la socio.

1./ Estas sendube, ke la daŭra kunvivado de viro kaj virino kaj ilia komuna zorgo pri la idoj, ankaŭ en komenca etapo de la homa raso, ofte okazis. Tiun kaŭzis la memsenpovo de novnaskita homo kaj tio, ke la homo relative nur en alta aĝo kapablas memstare penadi pri siaj bezonoj. Dum ĝia kreskado la gepatroj havas novajn idojn, pri kiuj same ili komune prizorgas. Tian aperon de monogamio oni povas priatenti ne nur ĉe la homo, sed ankaŭ ĉe pli evoluintaj vertebruloj.

Tamen ne dum tuta historio de la homaro estas suverena tiu ĉi formo de la familio. Estas konate laŭ la scienco, ke ekzistis diversaj formoj de la familio.

La epokon de plena ne-reguleco de la seksaj interrilatoj ni kalkulas je suba kaj supera grado de sovaĝeco, kiam el la provizore kunvivanta homgrupo mankis la konscio de pli daŭra kunaparteneco. Jen estis la stato de hordo. En tiu tempo ne ekzistis tia socia regulo, kiu estus preskribinta la daŭran kunekzistadon de la homparoj kaj estus limiginta en iu ajn rilato la parelekton. /Promiscuitus/

La ekscito de fajro, la invento de prilaborado de la arko, de argilvazo kaj ŝtonoj direktiĝis al pli daŭra grupiĝo de la homa asociiĝo. En tiu organizaĵo jam evoluis la malpermeso de incesto, kvankam provizore nur inter sinsekvaj generacioj. Sed interne de la generacio ne ekzistis malpermeso en ĉi evolua grado. /Sangparenca familio/ La parenca sistemo sur insulo Haway dokumentas, ke tia ekzistis.- La dua etapo de la malpermeso de incesto estis la malpermeso de edziĝo de frato kaj fratino. La gefratajn rilatojn signifas la deveno de komuna patrino kaj pro tio en tiu grupo, kiu unu familion kreas, anviroj kaj virinoj devas deveni de alia patrino, sed interne de la familio ankoraŭ ĉiu viro estas edzo de ĉiu virino. /Grup-geedziĝo/ - Poste la malpermeso disvastiĝas kaj estas malpermesita ankaŭ la edziĝo kun ido de gefratoj.Tiu fenomeno estis enkonduko de grandega progreso, ĉar ne nur la internan bredadon malpermesitaj gentoj pli rapide kaj pli komplete evoluis, sed ankaŭ pro tio, ĉar ĝi okazigis la sekciiĝon de la praa familio al nacio. - La komplikiĝo de geedziĝoj malpermesoj poste ekskludas ankaŭ la grup-geedziĝon, kaj ĉe la fino de sovaĝeco kaj barbareco estiĝas la duopa familio, en kiu stato la viroj ankaŭ plu havas rajtojn al poligamio, sed la virino dum la kunvivado estas devigata al fideleco. Tamen la infanoj apartenas eksluzive al la patrino. Sed dum tempo de la duopa familio, apartan mastrumadon, la unuopaj familioj ne havis. La komuneca mastrumado signifas la regadon de virinoj en la domo. /Matriarko, Patrinrajta/ Tiu ĉi formo karakterizas la tutan epokon de la barbareco.

La aparteno al sama gento baziĝas sur deveno de komuna prapatrino.La validigo de duopa geedziĝo nature estiĝis de iniciato de la virino kaj rezultigis, apud la patrino, la aperon de laŭdevena patro. Per la evoluo de produktaj interrilatoj kaj per kresko de la havaĵoj pliiĝis la signifo de la viroj, kiel akiranto de posedaĵo en la familio. Same pliiĝis la klopodo de la viroj, ke la heredan ordon oni ŝanĝu por la bonoj de siaj infanoj. Por tio okazis la ŝanĝo, ke la idoj de viroj de la gento restis anoj de la gento, sed la idoj de la virinoj transiris en genton de iliaj patroj. Al tio oni devis certigi la fidelecon de la virino, do la nekontesteblon de la patreco kaj por tio oni devis sin elliveri al absoluta potenco de la viro.- La renverso de patrinrajto estas mondhistorie signifa malvenko de la virina sekso.

2./ Tiu-ĉi malavantaĝo de la virino dum tuta epoko de la ekspluataj socioj restis valida. Ĝia ekkomenca formo estis la familio de familiestro de viro,- "patriarka" -, en kies semita formo sub la patra potenco de familiestro estis organizitaj certaj libera kaj mallibera homoj en la familio. Mem la familiestro havas plurajn edzinojn, la neliberuloj povas havi edzinon kaj infanojn. Per tiu formo de familio -"paterfamilias"- ni pasas en la epokon de skribita historio. Tiu-ĉi formo indikas transiron el la duopa geedziĝo al la monogamio, kiu estis karakteriza formo de la civilizacio kaj ĝia fina venko estas unu el la karakteriziloj de komenco de la civilizacio. La monoga-

mio estas unika el la konitaj familiaj formoj, en kiu la individua amo, kiel bazo de la familio povas elkreski. Por la edzino la monogamio, sekve de postulo de certa patreco, estas severa, sed la rajto de viro al la malfideleco estas malfermita. Tiu-ĉi familia formo igas samtempe la venkon de la originala privat-proprietaĵo super la instinkta komunumproprietaĵo. Laŭ grekoj ĝia rekonita celo estis la certigo de tiaj idoj, kiuj estas destinitaj al heredo de posedaĵo de la viro. Do anstataŭ la havaĵo de gento oni jam kondiĉas la privatan proprietaĵon de la viro.

En ŝtato vivanta socio, la monogamia familio ekzistas fakte, kiel rimedo de la akumuliĝo de havaĵo kaj rezervo de la havaĵkomunumo. Tiel ĝi ricevas protekton kaj estiĝas jura instuticio. En la ekspluataj socioj, la familiaj interrilatoj estiĝas juraj interrilatoj, estas potencaj interrilatoj. Kelkaj homoj estas en pozicio de potenco, aliaj estas en subordonita pozicio. Tiel estas ankaŭ en roma familio de la sklava epoko, kiu ankaŭ en epoko de la imperio havas sian karakteron de patra familiestro. Sed samtempe ĝi estas en tioma monogamio, ke ankaŭ la familiestro povas havi nur unu edzinon. Tiu situacio estas distingiĝa de la semita patra familiestro. La familio de roma civiljuro estas agnata, kiu tion signifas, ke tiujn personojn implicas, kiuj estas sub la sama potenco de patro.

Do, al la parenceco ne bezonas, eĉ ne sufiĉas mem la laŭ sangaparenceco. Mem la patrino nur tiuokaze estas parenco de sia infano, se ŝi mem estas sub potenco de patro de sia infano. La agnata familio de civiljuro vivis en domkomunumo. La super liberuloj regantan potencon de familiestro kompletigas ankaŭ la familikaraktera potenco super la sklavoj kaj iliaj havaĵoj. Ĉi-tiuj kune formas la objekton de privatjuran povon de la familiestro -patria potestas-, la familion.

Kontraŭ la agnata familio estas la surdevena -kognata- familio. La patrino estas la reprezentanto de la kognata familio, kvankam en la historia tempo oni kalkulas la parencecon laŭ patra kaj patrina devenlinio, escepte la eksteredzecan infanon. La kognatan familion ne karakterizas mem la domkomunumo. Simple per juraj rimedoj oni povis nek establi, nek ĉesigi la kognatan interrilaton. Paralele kun la disfalo de la sklavtena socio disfalis ankaŭ la domkomuneca ordo de familio. Pli kaj pli validas la formo de kognata familio, kiu poste estiĝis sola formo.

En la roma socio la subpremita situacio de la virino estas grandega realo, kiun poste mildigas la grada emancipado de la virino el sub potenco de la edzo kaj ĉe fino de la epoko de respubliko, la virino jam havas rajton al divorco, aŭ okaze de unuflanka retiriĝo de la virino, la edzo estis devigita allasi ŝin el sub edza potenco. La grada liberiĝo de la virino el sub edza potenco alkondukis al malboniĝo de virinaj moraloj, ĉar la geedza interrilato multfoje baziĝis sur interesoj de havaĵo kaj politikaj interesoj kaj ne sur reciproka inklino.

3./ Laŭ la dogmo de kristanismo la geedziĝo estas nedisigebla interrilato sankteca. En tiu sankteca geedziĝo ankaŭ por la edzo estas deviga la fideleco, kiu rezultiĝas el la egaleco de viro kaj virino. Ne ĉesas, sed laŭenhave ŝanĝiĝas la subordinita situacio de la virino. Kun la plena elformiĝo de feŭdalismo koincidas la evoluo de kanonjuro en la X. jarcento. En tiu tempo rekone la sanktecan karakteron de la geedziĝo, la monarkoj cedas ties aferon al la eklezio.

La 1563-a jara sinodo de Trident, apud la dogmo de eksedziĝo, fiksis la formalaĵojn de la geedziĝo kaj samtempe sufiĉe larĝigis la kazojn de senvalido de la geedzeco. Sekve de kadukiĝo de la potenco de eklezio kaj fortiĝo de reĝa aŭtoritato, la ŝtatpotenco al si postulis la aferon de la geedziĝo. Kvankam la eklezia edzumo de la mezepoko strukture konvenis al la feŭdala sociordo, sed ĉi sama feŭdala sociordo falis en kontraŭdiron. En tiu kontraŭdiro -malgraŭ la libera elekto de la geedzonta parto triumfis la financaj interesoj. En tiu ĉi epoko la geedziĝo ne estis la afero de la geinteresantoj, la reciproka inklino ne havis rolon. En la mezepoko la geedzeco estis garantiaĵo de la politikaj aliancoj.

4./ Dum evoluo, la koncepto de libereco de la burĝa ideologio konfliktis kun la ĝismorta ligo de la individuo. Tiun esprimis la protestanta religio, kiu neis la sanktecan karakteron de la edzumo kaj ĝian nedisigeblecon. En Francio la reĝa aŭtoritato jam en j. 1556 komencas eldoni dekretojn pri edzumo kaj ĝin transsendas sub jurordon de mondaj instancoj. Decidan ŝanĝon en la familia juro igis la franca revolucio. Artikolo 7. de Ĉapitro II. en la Konstitucio de j. 1791 enhavas la principon "La leĝo ne opinias la edzumon alia, ol civila kontrakto". Per kontrakta kvalifiko estis koneksa la nerenversebla vero, ke en la burĝa epoko oni opiniis senmorala ĉiun geedziĝon,kiu ne bazis sin sur la reciproka amo kaj ne estiĝis per interkonsento de la geedzontoj. Do, la ama edzumo estas homa rajto egala por la viro kaj virino.La burĝa juro la geedziĝon opiniis plej grava kontrakto malgraŭ ĉio, ja ĝi enhavas ĝismortan ordonon pri korpo kaj animo de la homoj. Tamen la plej progresan juron burĝan kontentigas la laŭforma konstato protokola de memvola interkonsento de la klientoj. Nek la leĝo, nek la juristo povas penadi pri la okazintaĵoj estantaj malantaŭ la kulisoj, kaj pri tio, ke kiel ili estiĝis.

Ankaŭ en la burĝa epoko, sur la edzumoj regis la havaĵaj interesoj, do ĝuste interne de la subpremita klaso povis validi la libera geedziĝo.Malgraŭ la feŭdala ordo, do la situacio, el vidpunkto de geedziĝa libero neŝanĝiĝis, nur la lokon de feŭdalaj proprietaj rilatoj, kiel decidaj faktoroj, okupis la kapitalismaj proprietaj rilatoj. En principo, laŭ la burĝa juro kaj morala opinio, estas samforma ankaŭ la geedza fideleco. Sed en la burĝa juro de familio ankaŭ la egalrajteco de la virino estas nur formala jura tezo.Ekzemple: estas speciala ordo pri la potenco de edzo super la havaĵo de la edzino, eĉ en la havaĵ-komunumo la rajton de la gepatra potenco super la infanoj unuavice havas la patro, en la plimulto de la kazoj oni devas opinii la edzon kiel perlaborantan, vivtenanton de la familio.

5./ En la epoko de la imperiisma kapitalismo pli multaj pretendas la eblecon de divorco, tamen pro strikte difinitaj kaŭzoj. Sed estas evidente,ke en la plimulto de malharmoniigitoj kaj sociajn taskojn ne plenumantaj edzumoj ne okazas divorco. Do, divorco kiel kontraŭpoluso de la monogamio -en ebleco de konkubo- nur tiam estas necesa, se iu el la geedzoj volas denove geedziĝi. La kaŭzojn en du ĉefkategorio oni povus grupigi: a./ la pereo de morala enhavo de la familio /demoralizo/, b./ ekstera disfalo de la familio /dismembriĝo/. Plej ofte la du kategorioj kune prezentas sin. Ekzistas tia koncepto pro la efiko de la faktoj, ke la familio plenumis sian historian destinon kaj kiel socia kaj jura institucio estas kondamnita je ĉeso. Aliaj konjektas, ke oni povas tiajn disponojn fari, kiuj estas taŭgaj al igo de denove sama fundamento en la perfekta burĝa familio mem.

6./ La plena libero de geedziĝo nur tiam povas ĝenerale prosperiĝi, se malaperas tiuj ekonomiaj /materialaj, financaj/ flankaj vidpunktoj, kiuj hodiaŭ tiom da influo havas ĉe la elekto de la geedzonta partio. La elformigita ordo de la socialisma ekonomio igas senperan efikon al la ŝanĝo de la familio. En la familia juro de socialismaj landoj efektiviĝas la sekvaj bazaj principoj:

a./ La edzumo estiĝu kaj ekzistu sur persona inklino deveninta el libera voldecido.

b./ En la edzumo prosperiĝu la plena egalrajteco de la virino, do la rilato inter viro kaj virino ne estu interrilato de potenco esprime la regadon de la edzo, sed la edzumo fakte estu libera alianco de du laborantoj.

c./La plej grava vivdestino de la familio estas la eduko de la infanoj. Nek la rilato inter infano kaj gepatroj estas interrilato de potenco, sed la gepatrajn rajtojn oni devas por intereso de la infano, utiligi. Surbaze de tiu rajto, la patro kaj patrino estas egalrajtaj.

d./ La geedzoj ankaŭ en la porgeedziĝa proprieta interrilato estas egalrajtaj partoj. Unu la alian reciproke subtenas kaj zorgas pri alia vivtenado.

e./ La edzumo ne estas nedisigebla. Eĉ kontraŭe, oni devas doni eblecon al disigo de la geedzaj interrilatoj netaŭgaj, al plenumo de socia tasko.

f./ La jura stato de la eksteredzeca-naskita-infano ne povas diferenci de jura stato de la en edzumo naskita infano.

g./ La socialisma ŝtato subtenas la gepatrojn inkluzive la solstarajn patrinojn per diversaj institucioj en plenumo de iliaj edukaj taskoj.

h./ Geedziĝon oni povas estigi nur antaŭ la ŝtata matrikulisto, la rolo de la eklezioj el ŝtata vidpunkto ĉesis.

En la socialismaj landoj voĉdonitaj leĝoj pri la familio konekse kun la Konstitucio, laŭ la socialisma moralo reguligas kaj protektas la instituciojn de edzumo kaj familio, garantias en la edzeco kaj familia vivo la egalrajtecon de la virinoj, la protekton de interesoj de la infanoj kaj akcelas la evoluon de la junularo.

D-ro Lajos Márton
-Hungarujo-

## LA PRINCIPO DE EGALRAJTECO DE SEKSOJ EN LA FAMILIA JURO ANGLA

Mi povas koncize pritrakti la temon, ĉar en la angla familia juro la egalrajteco de la seksoj estas preskaŭ perfekta. Estu komprenate, ke mi priparolos nur la anglan juron en la norda parto de Britujo, nomita Skotlando, la familia juro multe diferencas de la angla.

1. La geedziĝo. la minimuma aĝo por geedziĝi estas 16 jaroj. Tio rilatas egale al la junuloj kaj al la junulinoj.

Ĝis la aĝo 21 jaroj, neniu rajtas edziĝi aŭ edziniĝi sen la konsento de siaj gepatroj aŭ alia laŭleĝa kuratoro. La patro kaj la patrino havas egalan aŭtoritaton, do la edziĝontaj gefiloj bezonas la konsenton de ambaŭ. Se gepatroj senkaŭze rifuzas la konsenton, oni petas la ordonon de juĝisto por

permesi la geedziĝon sen konsento.

La impedimentoj trafas la du seksojn tute egale, kaj ĉiu malpermeso efikas inter ili reciproke. Ekzemple, onklo kaj nevino ne rajtas geedziĝi: reciproke onklino kaj nevo ne rajtas geedziĝi.

2. <u>Personaj rilatoj.</u> La angla juro pri ĉi tiu temo rapide evoluiĝis, kaj nuntempe virino tute egalas viron laŭ juraj kapabloj, juraj rajtoj, kaj juraj rimedoj por efikigi la rajtojn. Ŝi povas kontrakti tute same kiel li. Eĉ la kontraktoj pri iu ajn afero inter edzo kaj lia edzino same valoras kvazaŭ ili estus du fraŭlaj personoj.

Simile en la afero de la delikto, la devoj kaj la rajtoj de virino egalas tiujn de la viro, kaj la geedzoj rajtas procesi inter si.

Tre ofte edzo kaj edzino suferas vundojn en aŭto-akcidento. Unu kondukas, ambaŭ vundiĝas. La ĝenerala sekvo en Anglujo estas pretendo de la neŝoforo kontraŭ la ŝoforo, postulanta kompenson pro ĉi ties malzorga konduko de la aŭto. Oni komprenos, ke la vera celo de tiaj intergeedzaj procesoj estas pagigi asekuristojn.

3. <u>Proprietaj rilatoj.</u> Ankaŭ ĉi tiu fako estas regata de la principo de la egaleco de la seksoj.

La virino posedas la samajn kapablojn, rajtojn kaj devojn pri ĉiu speco de proprieto kiel la viro, kaj la geedziĝo ne tuŝas la proprieton.

Oni ne povas starigi ĝeneralan komunecon de la proprieto eĉ por kontrakto. Geedzoj tamen kapablas kune akiri kaj kune posedi iun apartan proprietaĵon laŭ la samaj kondiĉoj kaj reguloj kiel du fraŭlaj personoj.

Ĉi tie estas menciinda unu stranga restaĵo de la antikva juro. En Britujo oni severe impostas salajrojn, rentojn kaj ĉiuspecajn enspezojn. La procento de la imposto pligrandiĝas laŭ la sumo de la enspezoj de la koncerna individuo en la koncerna jaro, kaj la ŝtuparo estas kruta. Nu, kalkulante tiun imposton oni ŝuldigas edzoparon kiel unusolan individuon. Se ambaŭ havas grandan enspezon la aldona ŝarĝo pro la geedza stato multe pezas. Multaj instruistinoj, kuracistinoj, kaj similaj, ne plu laboras post la edziniĝo simple pro tiu malkuraĝiga imposto. Oni ankaŭ diras, ke kelkaj riĉaj paroj preferas la monon ol la moralon.

4. <u>Vivtenado de la Familio.</u> La seksoj staras laŭleĝe egalaj. Ĉiu persono, laŭ siaj rimedoj, devas subteni sian edzinon aŭ sian edzon, kaj siajn infanojn.

La respondeco pri vivtenado de la infanoj ĉesas kiam ili havas la aĝon 16 jaroj.

Respondeco pri la vivtenado de gepatroj ne plu ekzistas en Anglujo.

5. <u>Rilatoj inter gepatroj kaj infanoj.</u> Ĉi tie mi citos la koncernan leĝon de la jaro 1925. Ĝi tekstas:-

En ĉiu kazo pri la zorgado aŭ la edukado de infano aŭ pri la konservado de proprieto de infano, la juĝisto konsideru la bonstaton de la infano kiel la unuan kaj superan motivon de sia juĝo. Li tute ne konsideru ĉu el ceteraj vidpunktoj la pretendo de la patro superas la pretendon de la patrino, aŭ inverso.

Do la fundamenta principo de nia juro rilate la infanojn estas la egaleco de la gepatroj kaj la plena libereco de la juĝista decido.

6. <u>La eksedziĝo.</u> Ankaŭ ĉi tie la regulo estas la egaleco de la seksoj.

La ĉefaj kaŭzoj de la eksedziĝo same trafas ambaŭ geedzojn, nome /1/ adulto, /2/ kruela konduto, /3/ maljusta forlaso dum almenaŭ tri jaroj, /4/ frenezeco dum almenaŭ kvin jaroj.

Oni atentu tamen unu malegalan leĝon. Kiam edzo plendas pri la adulto de sia edzino, li rajtas postuli monan kompenson de la adultinta viro. Sed edzino de adultinta edzo havas neniun tian rajton kontraŭ la adultinta virino.

Sekvoj de la eksedziĝo. La financaj rajtoj tute submetiĝas al la libera bonjuĝo de la juĝisto, kiu devas konsideri la rimedojn kaj la konduton de ambaŭ partioj. En maloftaj cirkonstancoj oni eĉ ordonas, ke senkulpa partio pagu vivrenton al la kulpa partio. La sorto de la infanoj estas regata de la jam citita ĝenerala leĝo: la bonstato de la infano estas do la decidiga motivo, kaj neniu el la gepatroj havas superan rajton kompare kun la alia.

7. <u>La Heredo.</u> La sentestamenta heredo egale tuŝas ambaŭ seksojn. La rajtoj de vidvo precize egalas la rajtojn de vidvino, la porcio de filo estas la sama kiel la porcio de filino, k.t.p.

Pri testamentoj, la fundamenta leĝo estas la testamenta libereco de la mortanto. Ne ekzistas minimumaj laŭleĝaj porcioj por geedzoj, gefiloj, nek aliaj, do la testamento ampleksas la tutan proprieton de la mortanto.

La sola limigo estas la jena. En kelkaj kazoj la juĝisto povas ŝanĝi maljustan testamenton kiom necesas por prudente provizi la vivon al iu parenco de la mortinto. La ŝanĝo fariĝas laŭ la bonjuĝo de la juĝisto post konsidero de la vivrimedoj de la postulanto kaj de la heredantoj laŭ la testamento, ilia respektiva konduto rilate al la mortinto, kaj la ceteraj cirkonstancoj.

Nur gevidvoj, eksgeedzoj, kaj gefiloj de mortinto rajtas postuli ŝanĝon de la testamento. Kiom tuŝas gevidvojn kaj eksgeedzojn, la du seksoj staras egalrajtaj; nature la vidvinoj kaj eksedzinoj pli ofte povas pruvi praktikan maljustecon de la testamento ol la vidvoj kaj eksedzoj. Ekzistas certa malegaleco inter la gefiloj. Krom en la kazo de korpa aŭ mensa malkapableco, filo de la mortinto rajtas postuli nur vivprovizon ĝis li havos 21 jarojn, filino tamen ĝis ŝi edziniĝos.

---

Mi konscias ke mi nenion diris pri la relativaj rajtoj kaj devoj de la patrino kaj la patro de bastarda infano. Tiu parto de la angla juro en la nuna tempo rapide evoluiĝas, kaj mi ne povas koncize priskribi ĝin. La leĝodonantoj emas pligrandigi la rajtojn, sen pligrandigi la devojn, de la patro, kaj tio kelkfoje, laŭ mia opinio, efikas maljuste kontraŭ la patrino.

Mi ĝenerale opinias, ke la angla familia juro troviĝas nuntempe nerealisma. Dum la pasinta jarcento la Parlamento tute forĵetis la antikvajn leĝojn kiuj atribuis plenan povon al la laŭleĝa edzo kaj patro, por enkonduki teorian egalecon de la seksoj. Samtempe la Parlamento rifuzis enkonduki iaspecan komunecon de proprieto. Do en multaj procesoj la juĝistoj plenumas preskaŭ nefareblan taskon, t.e. malplekti la implikitajn aferojn de du personoj dum multaj jaroj geedzigitaj, kvazaŭ ili estus estintaj du sendependaj personoj. Mi kredas, ke se la edzeco mem daŭros en nia sociordo, ia sistemo de laŭleĝa komuneco baldaŭ ekestos, ĉar jam ekzistas inter la superaj juĝistoj grandaj individuaj diferencoj pri la solvo de tiaj problemoj.

E.I. Goulding advokato
- Britujo -

# LA PRINCIPO DE EGALRAJTECO DE AMBAŬ SEKSOJ LAŬ LA BULGARA FAMILIA JURO

La ŝanĝo de la sociordo en Bulgario, efektivigita en septembro 1944, malfermis la vojon al egalrajteco de ĉiuj civitanoj de la lando, sendepende de sekso, nacieco, religia kaj rasa aparteno.

Jam la 16-an de oktobro 1944 estis akceptita Leĝo pri Egalrajtigo de la Personoj el ambaŭ seksoj. Tiu ĉi egaligo koncernis la rajtojn de la virinoj en la sfero de la familia juro.

Ses monatojn post tiu dato - en majo 1945 - estis publikigita Leĝo pri la Geedzeco, en kiu la egalrajtigo de la virino kun la viro en la geedziĝo, en la familio kaj la divorco estis plendetale kaj komplete precizigita. Kaj post du jaroj - en decembro 1947 - tiuj grandaj demokratiaj konkeroj estis agnoskitaj en la nova Konstitucio de P.Resp.Bulgario.

La Konstitucio proklamas kiel fundamentan principon la egalecon inter la virino kaj la viro, en ĉiuj sferoj de la ŝtata, privat-jura, ekonomia, sociala, kultura kaj politika vivo de la lando.

Tiamaniere la egalrajtigo de l' virino kun la viro fariĝis konstitucia principo ankaŭ en la sfero de la famili-juraj interrilatoj kaj la heredado.

Tiu egaligo de la rajtoj estis konkrete precizigita en la Leĝo pri la Personoj kaj la Familio kaj en la Leĝo pri la Heredeco - ambaŭ datiĝantaj de la jaro 1949.

En kio konsistas ĝenerale la egalrajtigo de ambaŭ seksoj laŭ la bulgara familia juro?

## I. Kiel oni kontraktas geedziĝon

Antaŭ ĉio oni devas emfazi, ke en P.Resp.Bulgario pri la geedziĝo ekzistas neniaj obstakloj pro religiaj, rasaj, naciecaj, proprietaj aŭ aliaj diferencoj.

La kondiĉoj kaj la obstakloj por la geedziĝo estas ligitaj nur kun la zorgo pri geedziĝo ĉe absoluta libereco de l'geedzoj, observante difinitan aĝon, la principon de monogamio, antaŭgardante ambaŭ geedzojn kaj la idaron kontraŭ malsanoj, observante la striktan malpermeson pri geedziĝo inter proksimaj parencoj, pro biologiaj kaj moralaj konsideroj.

Ni traktu aparte tiujn ĉi kondiĉojn kaj obstaklojn.

### 1. Kondiĉoj.

a/ Aĝo. En P.Resp.Bulgario la aĝo por geedziĝo estas egala por la viro kaj la virino. Ĝi kongruas kun la plenaĝeco - 18 jaroj.

Kiel escepto, povas esti kontraktita geedziĝo ankaŭ fare de persono ne fininta la aĝon de 18 jaroj, sed fininta almenaŭ la aĝon de 16 jaroj. Tiaokaze oni devas peti specialan permeson de la prezidanto de la departementa tribunalo, kiu donas sian konsenton, se ekzistas pri tio gravaj konsideroj.

b/ Konsento. La konsento pri la geedziĝo devas esti donita persone de la geedzoj antaŭ la respektiva ŝtatoficisto en la registrejo de la magistratejo. La bulgara juro ne agnoskas kontraktadon de geedzeco pere de rajtigilo.

Necesas nur la konsento de ambaŭ geedzoj, esprimata libere, sen fizika aŭ psika perforto.

c/ Formo. En P.Resp.Bulgario estas enkondukita la civila geedzeco. Post la kontraktado de la geedziĝo, la geedzoj povas laŭplaĉe plenumi ankaŭ re-

ligian nupto-ceremoniaron, konforme al sia religia aparteno, sed ĝi havas nenian juran validecon.

2. Obstakloj por kontraktado de geedziĝo.

a/ Principo de la monogamio. En P.Resp.Bulgario ne povas kontrakti geedziĝon tiu persono, kiu estas ligita per alia geedzeco. Se malgraŭ tio oni kontraktus tian kroman geedziĝon, ĝi estos laŭleĝe nevalida /neefektiva/, kaj la kulpaj, pri ĝi, personoj, prenas sur sin la respektivan punrespondecon.

b/ Malsanoj. Ne povas kontrakti geedziĝon persono, kiu suferas psikan aŭ korpan malsanon, kiu ne donas al li la rajton manifesti efektivan konsenton pri geedziĝo aŭ kiu povus prezenti seriozan danĝeron por la sano de la alia el la geedzoj aŭ por la idaro.

c/ Malpermesata estas la geedziĝo inter proksimaj parencoj laŭ rekta origino, inter frato kaj fratino, inter adoptintoj kaj adoptitoj.

Principe estas malpermesata la geedziĝo inter parencoj laŭ nerekta origino en tria aŭ kvara grado /inter onklô kaj nevino, inter gefrataj kuzoj/. Tamen, kiel escepto, povas esti kontraktita geedziĝo inter tiaj parencoj nur kun permeso de la Prezidantaro de la Parlamento, post la prezentita konkludo de la komisiono, farinta la respektivan medicinan ekspertizon. En la vivmaniero kaj tradicioj de la bulgara popolo kuŝas la strebo eviti la geedziĝojn inter proksimaj parencoj.

II. Personaj rilatoj inter la geedzoj.

En la personaj rilatoj inter la geedzoj regas la principo de absoluta egalrajteco. Nek la edzo estas "estro" nek la edzino estas "subigita".La egaleco en la personaj rilatoj sin esprimas ankaŭ en agnosko de la laŭleĝa rajto de la geedzoj elekti libere sian profesion kaj domicilon.

III. Proprietaj rilatoj inter la geedzoj.

La ĝenerala principo ankaŭ en la proprietaj rilatoj restas la principo de absoluta egaleco inter la geedzoj.

1. Principo de proprieta apartigiteco.

En la proprietaj interrilatoj de la geedzoj, laŭ la familia juro de P. Resp.Bulgario, regas la principo de la apartigiteco. Ĉiu el la geedzoj posedas la rajton de proprieto sur la havaĵo, kiun li /aŭ ŝi/ estas akirinta je sia nomo antaŭ la geedziĝo kaj dum la periodo de la geedzeco. Laŭ tiu principo efektive estis defenditaj kaj defendataj la interesoj de la edzino, liberigita el la ekonomia dependeco de la edzo.

Nun la edzino, per siaj monrimedoj kaj laboro, povas akiri propran havaĵon, kiun la edzo ne rajtas disponi arbitre, kaj ĉe eventuala divorco tiu havaĵo restas ŝia proprieto.

2. Komuna proprieto. Dum la periodo de la familia kunvivado la geedzoj povas akiri ankaŭ komunan havaĵon /ekzemple: loĝejon, leĝeran aŭton aŭ alian havaĵon/ je la nomo de ili ambaŭ. Tiam ili fariĝas laŭleĝe kunproprietuloj kaj ĉiu el ili rajtas disponi pri sia nedividebla parto.

Sed komuna havaĵo dum la periodo de la geedziĝo kreiĝas ankaŭ el la ekipilaro por la hejmmastrumado: tapiŝoj, televidilo, kuirilaro, litoj kaj dormokovriloj, biblioteko, mebloj k.a. Ordinare oni konsideras, ke ĉiu el la edzoj rajtas pri la duono de tiu ĉi havaĵo. Kiel escepto, tiu proporcieco povas esti ŝanĝata.

IV. Rajtoj kaj devoj de la geedzoj rilate al la vivtenado de la familio.

Pri la vivtenado de la familio estas egale devigataj zorgi ambaŭ partoj

de la geedzoj konforme al siaj materialaj ebloj. Per reciproka interkompreno kaj komunaj klopodoj la geedzoj estas devigataj garantii la prosperon de la familio kaj zorgi pri la vivtenado kaj edukado de la infanoj ĝis 18 jaroj.

Pri la taskoj, kiujn unu el la geedzoj prenas sur sin koncerne la ĉiutagajn bezonojn de la mastrumo, respondecas solidare ankaŭ la alia el la geedzoj. Tiamaniere estas defendeblaj la interesoj ne nur de la krompersonoj kaj la komerca interŝanĝo, sed ankaŭ la interesoj de anbaŭ geedzoj kaj de la familio.

V. Juraj rilatoj inter gepatroj kaj infanoj.

1. Konstato de la patrineco kaj la patreco.

La rilatoj de patrineco kaj patreco estas bazitaj sur la samsanga origino kaj sur la adoptado.

La patrinecon oni konstatas per la fakto de la nasko. La patreco estas konstatebla: a/ per la supozo, ke patro de la infano naskita de la respektiva virino estas ŝia edzo, se la infano estas naskita dum la geedziĝo aŭ ĝis la forpaso de 300 tagoj post la dato de la ĉesiĝo de la geedziĝo per divorco aŭ pro morto; b/ per konfeso fare de iu viro, ke la naskita, de la respektiva virino, infano estas lia; c/ per juĝproceduro, konstatinta kiu estas la patro.

2. Rajtoj de la infanoj, naskitaj ekster laŭleĝa geedziĝo.

Granda akiro per la nova bulgara familia juro estas la plena egalrajteco de la ekstergeedzecaj infanoj kun la infanoj naskitaj dum laŭleĝa geedzeco. Ekzistas nenia diferenco en iu ajn rilato inter geedzecaj, ekstergeedzecaj kaj adoptitaj infanoj. Ĉiuj infanoj, kies origino estas konstatita, ĝuas egalajn rajtojn rilate al siaj gepatroj: rajton pri vivtenado, heredrajton, rajton pri la nomo ktp.

3. La adopto.

La adoptita infano ĝuas la samajn rajtojn kiajn ĝuas la naskito dum la geedzeco. La adoptintoj havas la samajn rajtojn kaj devojn kiajn ili havas al siaj propraj infanoj. La adoptita infano laŭleĝe likvidas ĉiam dependecon kun siaj propraj gepatroj kaj akiras la kvaliton de propra, samsanga infano rilate al la adoptintoj. Povas esti adoptitaj infanoj ĝis maksimuma aĝo de 18 jaroj kondiĉe, ke tio estas nur je ilia profito. Pli ol tiu ĉi aĝ-maksimumo la adopto estas absolute malpermesata.

4. Reprezentado de la infanoj fare de la gepatroj.

Ĉiu el la gepatroj povas sola reprezenti la infanojn en la civila vivo, dum ili restas ankoraŭ neplenaĝaj, aŭ li /aŭ ŝi/ povas esti ties kuratoro dum ilia aĝo inter 14 kaj 18 jaroj.

Ĉiujn demandojn konekse kun la prizorgado kaj la edukado de la infanoj, ambaŭ gepatroj solvas kune, per komuna interkonsento. Se pri iu grava demando ili ne povas esti en konkordo, la disputon solvas la tribunalo.

5. Apartigo de la havaĵo de gepatroj kaj infanoj.

Ekzistas plena apartigo inter la havaĵoj de gepatroj kaj infanoj. Ĉiu el la infanoj povas havi sian propran havaĵon. La gepatroj havas rajton kaj devon administri tiun havaĵon, kolekti la enspezojn, ricevitajn el ĝi kaj uzi tiujn por la bezonoj de la infanoj. Sed la gepatroj tute ne rajtas disponi arbitre pri la havaĵoj de la infanoj. Pri ĉiu respektiva necesa disponado, la gepatroj estas devigataj peti specialan permeson de la tribunalo.

VI. Divorco.

Laŭ la familia juro de P.Resp.Bulgario ekzistas libereco rilate al la

divorco. Tio ankaŭ estas esprimo de egaleco inter ambaŭ seksoj. Per la libereco rilate al la divorco, oni donas eblon al la edzino aŭ al la edzo liberigi sin de geedzeca ligo, kiu estas perdinta sian socian signifon kaj kiu en multaj okazoj estas fariĝinta netolerebla ŝarĝo. Tamen, la libereco pri divorco tute ne signifas, ke en P.Resp.Bulgario la geedzecoj povas esti facile ĉesigataj laŭ kaprico de la geedzoj.

Principe, la divorco prezentas per si mem negativan socialan fenomenon. Ĝi ne estas dezirata de la socio kaj oni aplikas ĉiujn eblajn antaŭrimedojn por ties maksimuma limigo. La divorco estas neevitebla malbono. Pro tio, la divorco estas kontrolata de la ŝtato pere de la tribunalo. La geedzoj devas prezenti seriozajn motivojn por divorco. Kontrolinte la verecon de iliaj asertoj, la tribunalo devas konvinkiĝi, ke la daŭrigo de la geedzeca kunloĝado plue estas nek en profito de la geedzoj kaj la infanoj, nek en profito de la socio.

Unu el la specifaj karakterizoj de la bulgara familia juro rilate al la divorco estas jena; oni ne permesas la divorcon laŭ la peto de la kulpa edzo /aŭ edzino/, se la ne-kulpa ne konsentas. Tiamaniere oni batalas kontraŭ la senprudenta kaj senrespondeca detruo de la familio kaj oni observas la principon, ke "neniu rajtas profiti sian propran kulpon."

En tio sin esprimas unu el la esencaj signifoj de la kulpo pri la divorco.

La kulpo pri la divorco havas signifon ankaŭ por la vivtenado inter la eksaj geedzoj kaj por la utiligo de la familia loĝejo post la ĉesigo de la geedzeco.

Oni permesas la divorcon, kiam la geedzeco estas detruita, kiam ĝi troviĝas en tiom profunda kaj plena malharmonio, ke el vidpunkto de la geedzoj, de la infanoj kaj de la socio oni ne plu povas pledi pri daŭrigo de la familia vivo.

Kompreneble, la kaŭzoj por la perturbo de la geedzeco estas detale esplorataj, por povu oni konstati ĝis kioma grado ili estas kontribuintaj por la neebleco restarigi la familian vivon. En la praktiko mem, la pli gravaj kaŭzoj estas: rompo de la geedza fideleco, korpaj perfortoj kaj moralaj turmentoj, alkoholismo, reciproka seksa malkonveneco, malsanoj, malutila interveno de parencoj en la intiman vivon de la geedzoj ktp. Cetere tio estas universalaj kaŭzoj, validaj en ĉiuj landoj. En nia lando ili estas motivoj por divorco nur se ili kreas profundan perturbon kaj malharmonion en la vivo de la geedzoj.

1. Proprietaj rilatoj post la divorco.

a/ Post la divorco ĉiu el la geedzoj ricevas sian propran personan havaĵon.

b/ Krom tio, ĉiu el la geedzoj ricevas parton de la komuna havaĵo.

c/ Fine, ĉiu el la geedzoj rajtas ricevi parton de tiu havaĵo de la alia el la geedzoj, kiun li /aŭ ŝi/ estas akirinta dum la periodo de la geedzeco per sia kunlaborado.

d/ Vivtenado inter la eksaj geedzoj.

Tuj post la ĉesigo de la geedzeco senvalidiĝas la motivo pri reciproka helpo inter la geedzoj. Ne plu validas la postulo pri reciproka vivtenado en okazo de neceso. Malgraŭ tio, la devigo pri reciproka vivtenado validas tri jarojn post la divorco, ĉe iuj kondiĉoj. Tio estas konsekvenco de la ĉesigita geedzeco, daŭrigo de la reciproka helpo, je kiu la bezonanta eksa edzo /aŭ edzino/ estas senigita ne pro sia kulpo. Ĝuste pro tio, vivtenadon povas postuli

nur tiu el la eksaj geedzoj, kiu ne kulpas pri la divorco. Unu el la geedzoj estanta kulpa pri la divorco ne rajtas postuli tian de la alia el la geedzoj. Nur tiu el ili, kiu kulpas pri la divorco, ŝuldas vivtenadon al la alia, kiu ne kulpas /Se la divorco estas permesata pro kulpo de ambaŭ geedzoj, neniu el ili ŝuldas vivtenadon/.

La sana el la geedzoj ŝuldas vivtenadon al la malsana, kiam la divorco estas verdiktita pro malsaniĝo, sen kulpo.

En ĉiuj okazoj vivtenado estas ŝuldata nur al tiu el la eksaj geedzoj, kiu bezonas ĝin /kiu estas nelaborkapabla kaj se li /aŭ ŝi/ ne povas vivteni sin per siaj havaĵoj. Tion li /aŭ ŝi/ rajtas maksimume dum tri jaroj post la dato de la divorco.

2. La familia loĝejo post la divorco.

Unu el la gravaj demandoj post la divorco estas tiu pri la ricevo de la familia loĝejo de la eksaj geedzoj. Post la divorco la kunloĝado de la eksaj geedzoj fariĝas neebla, pro la kreitaj malbonaj rilatoj,kaj ankaŭ el vidpunkto de la moralo. Unu el ili devas forlasi la familian loĝejon, se ĝi ne povas esti oportune dividita en du apartajn loĝejojn.

Unue la familia loĝejo estas disponigata al tiu el la geedzoj, al kiu la tribunalo estas komisiinta la taskon prizorgadi kaj eduki la infanojn. Do, la intereso de la infanoj havas antaŭecon /avantaĝon/. Ni devas tuj rimarkigi, ke ne gravas la fakto kiaj infanoj restas vivi ĉe la edzo /aŭ edzino/: propraj, adoptitaj, naskitaj dum la geedzeco aŭ ekster la geedzeco, duoninfanoj aŭ infanoj de alia geedzeco, sendepende de tio ĉu ili estas knaboj aŭ knabinoj.

Se ne estas infanoj, tiam kiel kriterio servas la kulpo pri la divorco. La loĝejon oni disponigas al la nekulpa el la geedzoj, kaj la kulpan oni forigas el la loĝejo. Ĉe kulpo de ambaŭ geedzoj, la tribunalo decidas laŭ justeco, prikonsiderante la gradon de ilia kulpo, la sanstaton de la geedzoj, iliajn materialajn eblojn, kunloĝadon kun aliaj proksimuloj ktp.

Ĉe divorco sen kulpo, pro malsano, la loĝejon oni disponigas al tiu el la geedzoj, kiu estas malsana.

Ĉe la solvo de la demando al kiu el ambaŭ geedzoj oni devas disponigi la familian loĝejon oni ne prikonsideras la rajton de proprieto. La proprietulo povas esti forigita el la loĝejo, se oni ne lasas la infanojn loĝi ĉi li,se li kulpas pri la divorco aŭ se oni devas garantii loĝejon al tiuj el la geedzoj, kiu estas malsana.

VII. La heredrajto de la geedzoj.

La geedzoj heredas unu de la alia sendepende de la sekso. Ĉiu el la geedzoj havas egalajn heredrajtojn, kiel la alia. Ĉe heredado el la mortinta el la geedzoj, la viva konkuras kun la infanoj el la geedzeco, kun liaj /aŭ ŝiaj/ ascendaj parencoj /gepatroj, avo, avino/ kaj kun liaj /aŭ ŝiaj/ gefratoj kaj iliaj infanoj. Se ne estas tiaj parencoj de la mortinta edzo /aŭ edzino/, la postvivinta edzo /aŭ edzino/ sola ricevas la tutan heredaĵon.

Kiam li /aŭ ŝi/ konkuras kun siaj infanoj, la postvivinta edzo /aŭ edzino/ ricevas parton egalan al la parto de ĉiu infano.

Ĉe konkurado kun ascendaj parencoj de la mortinta edzo /aŭ edzino/ aŭ kun gefratoj aŭ iliaj infanoj, la postvivinta edzo /aŭ edzino/ ricevas la duonon de la heredaĵo, se depost la dato de la geedziĝo ĝis la morto estas forpasintaj malpli ol 10 jaroj; se estas forpasintaj pli ol 10 jaroj, li /aŭ ŝi/

ricevas du trionojn /2/3/ de la heredaĵo.

La geedzoj rajtas ankaŭ pri la tiel nomata rezervita parto. Ĝi estas tiu parto de la heredaĵo, pri kiu la heredigantа edzo /aŭ edzino/ ne povas disponi ilin por fari donacojn kaj testamentojn. La rezervita parto de la edzo /aŭ edzino/ estas unu duono /1/2/, kiam li /aŭ ŝi/ heredas sola. /Do en tiu ĉi okazo la mortinta edzo /aŭ edzino/ rajtis dum sia vivo disponi la duonon de sia havaĵo, por fari donacojn aŭ testamenton, kiam la heredigantо estas postlasinta ankaŭ gepatrojn, tiam la rezervita parto de la edzo /aŭ edzino/ estas unu triono /1/3/; kiam li /aŭ ŝi/ estas postlasinta descendajn parencojn kaj edzon /aŭ edzinon/ la rezervita parto estas egala je la parto de ĉiu infano. Tiuokaze la mortinta edzo /aŭ edzino/ estus povinta dum sia vivo disponi pri unu triono /1/3/ de sia havaĵo, havante edzon /aŭ edzinon/ kaj unu infanon; pri unu kvarono /1/4/, havante edzon /aŭ edzinon/ kaj du infanojn, kaj havante tri aŭ pli da infanoj, li /aŭ ŝi estus povinta dum sia vivo disponi unu sesonon /1/6/ de sia havaĵo.

Genĉo Genĉev,
advokato, scienca kunlaboranto
kaj membro de la Scienca Konsilio
de la Jura Instituto ĉe la Bulgara Akademio de la Sciencoj
- Bulgario -

## LA PRINCIPO DE EGALRAJTECO DE SEKSOJ EN LA FAMILIA JURO DE LA FEDERACIA RESPUBLIKO GERMANUJO

En la postmilita jura evoluo de la Federacia Respubliko Germanujo la Problemo de Egaleco de Seksoj certe estis unu el la plej malfacilaj. Art. 3 alineo 2 de la Federacia Konstitucio de 1949, unu el la Fundamentaj Rajtoj, tekstas jene: "Viroj kaj virinoj estas egalrajtaj". Al tiu ĉi principo multaj leĝoj ne estis konformaj, precipe ne la Civila Kodo. Por lasi tempon por la farado de novaj leĝoj la Federacia Konstitucio prokrastis la ekvalidon de ĉi tiu normo pri egalrajteco ĝis la 31-a de marto 1953.

Venis la 31-a de marto 1953 kaj ne ekzistis adaptiga leĝo. Tiam komenciĝis granda ĥaoso en la germana familia juro, kiu finiĝis nur 5 jarojn poste. Ŝajnas, ke la kreintoj de la Federacia Konstitucio ne pripensis la malfacilaĵojn kiujn enhavas la problemo de Egalrajteco de Seksoj. Oni ne povas solvi ĝin per kreado de laŭvorte samaj normoj por viroj kaj virinoj. Tia "egalrajteco" estus nur formala. La ŝtato ne povas dekreti, ke virino estas viro. Necese diferencigi pro sociaj, biologiaj kaj aliaj kaŭzoj. La Leĝo pri Egalaj Rajtoj de Viroj kaj Virinoj fine ekvalidis je la 1-a de julio 1958. Ĉi tiu leĝo ne celas al formala egaligo, sed al egala pozicio en la praktiko.

1/ Kondiĉoj por geedziĝo.

Pro manko de spaco mi ne povas pritrakti ĉiujn kondiĉojn de geedziĝo. Mi mencios nur tiujn, kiuj estas malsamaj por viroj kaj virinoj. Temas unue pri la aĝo. Viro povas edziĝi nur se li estas plenaĝa, do se li havas minimume 21 jarojn aŭ se kortumo deklaris lin plenaĝa kaj li havas minimume 18 jarojn. Kontraŭe, neplenaĝa virino rajtas edziniĝi kun konsento de siaj gepatroj, se ŝi havas minimume 16 jarojn.

Post eksedziniĝo pro iu ajn kaŭzo, virino rajtas reedziniĝi nur 10 monatojn post la fino de la antaŭa geedzeco, se ŝi ne ricevis permeson de la koncerna instanco. Ĉi tiu impedimento rilatas al la leĝaj supozoj pri patreco.

2/ Personaj rilatoj.

Per la geedziĝo la edzino ricevas la familian nomon de la edzo; sed ŝi rajtas aldoni al tiun nomon ŝian naskiĝnomon. Krom tio ne ekzistas malegaleco.

3/ Proprietaj rilatoj.

Se la geedzoj ne faris geedzan kontrakton regas la t.n. Komuneco de Gajno /Zugewinngemeinschaft/. Ĉi tiu nomo estas erariga. Ne temas pri tio, ke la akiro fariĝas komuna, male regas dum la geedzeco strikta aparteco de havaĵoj; la Komuneco de Gajno realiĝas nur post la fino de la geedzeco, aŭ per morto aŭ per divorco. Oni komparas la valoron de la havaĵoj de ambaŭ partio de la geedzoj je la komenco de la geedzeco kaj je la fino. Tiu, kiu havis pli grandan gajnon devas pagi al la alia parto, monsumon tiom grandan, ke post la pago, la gajno de ambaŭ partoj estas egaligita. En kazo de divorco tiu devo pri egaligo ne dependas de la kulpo. Ankaŭ la kulpa parto rajtas postuli egaligon.

Oni povas fari geedzan kontrakton antaŭ, aŭ post la geedziĝo. Tiaj kontraktoj temas pri Aparteco de Havaĵoj /sen devo pri egaligo, tion faras precipe komercistoj/ aŭ pri Komuneco de Havaĵoj, per kio la havaĵoj de ambaŭ geedzoj fariĝas komunaj /tion precipe faras kamparanoj/. Geedzaj kontraktoj kun aliaj reguloj estas eblaj, sed fakte ne ekzistas.

4/ Rajtoj kaj devoj rilate la vivtenadon de la familio.

Ambaŭ geedzoj devas kontribui al la vivtenado de la familio. La edzino normale plenumas ĉi tiun devon per sia hejma laboro kaj nur en eksterordinaraj cirkonstancoj ŝi devas labori ekster la hejmo, kaj kun sia salajro kontribui al vivtenado.

5/ Rilatoj inter gepatroj kaj infanoj.

Ambaŭ geedzoj rajtas kaj devas zorgi pri la infanoj. Tio rilatas ankaŭ al la reprezentado de la infanoj. Nur decidoj de ambaŭ gepatroj validas.

La situacion post divorco mi klarigos poste.

6/ Eksedziĝo.

Mi pritraktos nur tiajn normojn, kiuj estas malsamaj por viroj kaj virinoj. Mi ankaŭ ne pritraktos la nuligon de geedzeco, kiu estas malofta.

Ne ekzistas malsamaj kaŭzoj de divorco por viroj kaj virinoj. Post divorco ĉiu parto rajtas peti decidon de kortumo pri divido de la mebloj kaj de la hejma ilaro, krom tio pri la uzo de la komuna loĝejo. La kortumo ne estas devigata nepre sekvi la proprietajn rajtojn.

La divido de la aliaj havaĵoj dependas de la geedza proprieta stato. Normale regas la t.n. Komuneco de Gajno kaj mi jam klarigis kiel okazas la egaligo.

Se pro kontrakto regas Komuneco de Havaĵoj, la komunaj havaĵoj estas dividataj en du samajn partojn. Antaŭ la divido la nekulpa parto rajtas elpreni tiujn objektojn, kiuj apartenas al li jam antaŭ la geedziĝo aŭ kiujn li akiris per heredo aŭ donaco. Se pro kontrakto regis Aparteco de Havaĵoj kompreneble ne okazas divido. Post divorco ĉiam okazas decido de kortumo, kiu transdonas al unu el la gepatroj la rajton de zorgado pri la infanoj.

7/ Laŭleĝaj heredaj rajtoj.

Se ne ekzistas testamento, la situacio estas jena:

Se la mortinta edzo aŭ edzino postlasis idojn, la postvivanto havas heredan kvoton de 1/4 kaj la idoj havas kvoton de 3/4. Se ne ekzistas idoj,la postvivanto ricevas 1/2 kaj la gepatroj aŭ gefratoj de la mortinto la alian 1/2. Tio validas ĉiam, se ne regis Komuneco de Havaĵoj aŭ Aparteco de Havaĵoj.

Se regis la laŭleĝa geedza stato de Komuneco de Gajno, la postvivanto ricevas plian kvaronon de la heredo, se li rezignis pri egaligo de gajno /ne gravas ĉu li fakte havas tian rajton/. Preskaŭ ĉiam la postvivanto elektas la "egaligon per heredo", ĉar tio estas preskaŭ ĉiam pli favora kaj ĉiam pli simpla. Do, fakte en la plimulto de la kazoj la postvivanto ricevas apud idoj unu duonon kaj apud la gepatroj aŭ gefratoj tri kvaronon de la heredo.

8/ Konkludo.

La leĝo pri Egaleco de Viroj kaj Virinoj alportis la ĝis nun, plej gravajn ŝanĝojn de la germana Civila Kodo. Ŝajnas, ke la nuna leĝa stato validos dum sufiĉe longa tempo.

D-ro Ludwig Röll
notario
-Germana Federacia Respubliko-

## LA PRINCIPOJ DE EGALRAJTECO DE SEKSOJ EN LA FAMILIA JURO DE HUNGARLANDO

Tiuj fundamentaj ŝanĝoj, kiuj okazis depost la liberiĝo de Hungarlando, en nia ekonomia kaj socia vivo, efikis transformiĝe ankaŭ al la geedzeca kaj familia vivo de la civitanoj.

La geedziĝo, kiun en la pasinta sociordo estigis laŭkutime ekonomiaj konsideroj, kaj kiu konstruiĝis je la subordineco, dependeco kaj sendefendeco de la virino, ĉiam pli transformiĝis al socialisma geedzeco, do al memvola komuneco de du liberaj kaj egalrajtaj homoj, fondiĝita je reciproka altiriĝo.

La celo de tiu interrilato - baziĝanta je socialisma moralo - estas, ke la geedzoj, komencante veran kaj kompletan vivkomunecon, apogu unu la alian, eduku siajn infanojn tiaj homoj, kiuj scipovos konstrui kaj evoluigi la socialisman socion.

La principojn de la egaleco de seksoj en la hungara familia juro regulas en Hungarlando la leĝo IV-a, de jaro 1952, pri la familia juro. Tiu leĝo plej-plene certigas - surbaze de la hungara Konstitucio - la egalrajtecon de la virinoj.

En la aferoj de la familia vivo, la leĝo ĉesigas la privilegian situacion de la edzo kaj certigas la egalrajtecon de la geedzoj. Por la virino ebligas uzi la nomon de la edzo, sed ne devigas tion. Donas rajton por la virino, teni ekskluzive sian propran nomon. Sur la tereno de la geedzeca havaĵrajto, starigas la geedzecan havaĵkomunecon, kiu efektivigas inter la geedzoj - dum la daŭro de la geedzeco - veran havaĵkomunecon de la geedzoj, kiu fondiĝas sur la plena egaleco de la geedzoj. Mi traktos du problemojn: 1./ La geedziĝo. 2./ La rajtoj kaj devoj de la geedzoj.

1./ La geedziĝo. La geedziĝo, laŭ la hungara familia juro estas libera kaj propravola, monogama asocio de egalrajtaj viro kaj virino, kiu estigas familion, kreas geedzecajn rajtojn kaj devojn, kaj kiu estiĝas laŭ la koncer-

naj leĝaj reguloj.

En nia socio, malantaŭ la geedziĝo ne staras ekonomia devigo, nek aliaj sociaj, rasaj, religiaj, naciaj obstakloj. Ne limigas la liberecon de la intenco al geedziĝo, la postulo de la interkonsento de la gepatroj.

La familijuraj leĝoj de la socialismaj landoj en la reglamento de la geedziĝo, efektivigas la konstitucian principon de la disigo de ŝtato kaj eklezio. Tial, geedzecajn rajtojn kaj devojn fondiĝantajn efikojn stribuas nur al la geedziĝo, farita antaŭ ŝtata organizo.

La celo de nia familijura leĝo: Surbaze de la paragrafoj 50-52-aj de nia Konstitucio kaj konvene al nia popoldemokratio kaj socialisma moral-koncepto ĝi celas reglamenti kaj defendi la institucion de la geedzeco kaj familio, certigi en la geedzeco kaj familia vivo la egalrajtecon de la virinoj, la defendon de la interesoj de infanoj kaj akceli la evoluon kaj edukadon de la junularo.

Kiel estiĝas la geedziĝo? Geedziĝo estiĝas, se la kunestantaj geedziĝontoj persone deklaras antaŭ la oficiale funkcianta delegito de la plenumkomitato de loka konsilantaro /matrikulisto/, ke ili - unu kun la alia - geedziĝi volas. La geedziĝo okazas publike, antaŭ du atestantoj, en oficejo por tiu celo destinita.

Okaze de iu eksterordinara cirkonstanco, la geedziĝo povas okazi ankaŭ ekster de la oficejo de matrikulisto.

La geedziĝo devas okazi antaŭ tiu matrikulisto, sur kies teritorio loĝas almenaŭ unu el la geedziĝantoj.

Post la deklaro de la geedziĝantoj, la matrikulisto registras la geedziĝon en la matrikulon. Antaŭ la geedziĝo, la geedziĝantoj devas deklari ankaŭ la matrikulisto, ke laŭ ilia plej bona scio, ne estas laŭleĝa obstaklo, kontraŭ la farota geedziĝo, samtempe devas demonstri la leĝajn premisojn de la geedziĝo.

Eksterlande farita geedziĝo: Se ambaŭ geedziĝantoj estas hungaraj civitanoj, ili povas geedziĝi ankaŭ eksterlande, antaŭ la hungara eksterlanda reprezenta instanco, kondiĉe, ke baze de reciprokeco, la konsilantaro de la ministroj rajtigis la eksterlandan reprezentan instancon por kunlabori en tiaj geedziĝoj. Tiuokaze tiajn geedziĝojn oni devas konsideri, kiel hungarlande faritajn.

Geedziĝo de eksterlandanoj: Se eksterlandano volas geedziĝi en Hungarlando, devas legitimi, ke la geedziĝo ne havas malhelpon, laŭ sialanda juro. La justicministro povas doni absolvon de sub tiu legitimo.

Al la geedziĝo de hungara civitano, kun eksterlandano, estas necesa la permeso de la Prezidanta Konsilantaro de Hungara Popolrespubliko.

2./ La rajtoj kaj devoj de la geedzoj. En la geedza vivo la geedzoj havas egalajn rajtojn kaj devojn. Ili devas esti fidelaj, unu al la alia, kun reciproka helpo. La loĝejon de la geedzoj elektas interkonsente. La edzino uzas la nomon de la edzo, kun edzina aldono, al kiu povas ligi sian propran nomon, sed se ŝi volas uzi nur sian propran nomon, antaŭ la geedziĝo devas sciigi pri tio la matrikuliston. Se la virino uzis edzan nomon, post la morto de la edzo povas elekti, ĉu tenas la edzan nomon, aŭ sciigas la matrikuliston, ke ŝi volas plu uzi sian propran nomon.

Geedzeca havaĵ-komuneco: La geedziĝo estigas inter la geedzoj geedze-

can havaĵ-komunecon. Konvene al tiu, ĉio estos nedividita komuna havaĵo de la geedzoj, kion ili akiris dum la ekzistado de la geedzeco, ĉu komune, ĉu aparte ili akiris, escepte de tiuj objektoj, kiuj estas apartaj proprietoj de la geedzoj.

Antaŭ la geedziĝo oni ne rajtas ekskludi la geedzecan havaĵ-komunecon, nek tute, nek parte.

Apartaj proprietoj de la geedzoj estas jenaj:

a./ Tiuj objektoj, kiujn iu havis antaŭ la geedziĝo;

b./ kiujn la edzo, aŭ edzino ricevis donace, akiris herede, aŭ ricevis per distingo;

c./ tiuj, kiuj anstataŭas la pli fruajn apartajn proprietojn.

La objektojn, kiuj apartenas al havaĵ-komuneco, la geedzoj povas uzi laŭdestine, ili rajtas tiujn komune manipuladi. Tiujn kostojn, kiuj estas bezonataj por la konservado kaj manipulado de la komunaj havaĵoj, devas kovri unuavice el la komuna havaĵo kaj se ĝi ne sufiĉas, la geedzoj devas laŭproporcie kontribui al la kostoj, el siaj proprietaĵoj.

La juĝejo ĉesigas la havaĵ-komunecon dum la geedza kunvivado, se tion la geedzoj komune petas, por grava kaŭzo.

Cetere, la havaĵ-komuneco ĉesas per la finiĝo de la geedzeco kaj kiu ajn el la geedzoj povas postuli la interdividon de la komuna havaĵo. La havaĵpartojn de la geedzoj, el la komuna havaĵo devas eldoni ennature, kaj se tio ne estus ebla, la juĝejo decidas pri la dividmaniero.

<u>La kostoj de la komuna mastrumado:</u> La kostojn de la komuna mastrumado devas kovri unuavice el la laborgajno, enspezo kaj komuna havaĵo de la geedzoj. Se tiuj ne kovras la kostojn, la geedzoj devas proporcio kontribui per siaj proprietaĵoj.

Se nur unu el la geedzoj havas apartan proprieton, tiu mem devas kompletigi per la necesa sumo, la elspezojn de la komuna mastrumado.

D-ro Bálint SZEMENYEI,
prezidanto de la distrikta juĝejo,
- Hungarujo -

## LA PRINCIPO DE EGALRAJTECO DE SEKSOJ EN LA FAMILIA JURO DE ITALIO

1. <u>Kondiĉoj pri la geedziĝo.</u> Minimuma aĝo por la viro 16 jaroj, por la virino 14 jaroj /pro gravaj kialoj kaj per speciala permeso de jura aŭtoritato, ŝtata prokuroro, tiu aĝlimo povas esti respektive de 14 kaj de 12 jaroj/

Por neplenaĝaj gejunuloj /malpli ol 21 jaraj/ estas necesa la konsento de la patro aŭ de la persono kiu plenumas la patran povon.

Impedimentoj al geedziĝo estas parencaj aŭ boparencaj rilatoj, enlistigitaj en la civila kodo; de kelkaj el ili estas liberigeblaj, per decido de ŝtata prokuroro.

Geedziĝo okazas per civila aŭ kaj per religia ceremonio; la religia katolika geedziga ligo validas ankaŭ por la civila juro, kondiĉe ke la celebrinto sekvu kelkajn regulojn fiksitajn en la konkordato inter la ŝtato kaj la eklezio /la plej granda parto de la geedziĝoj okazas laŭ tiu regulo/.

2. <u>Personaj rilatoj.</u> La civila kodo ordonas, ke devoj de ambaŭ geedzoj estas; kunloĝi, esti reciproke fidelaj kaj zorgemaj; edzino devas sekvi edzon

en la, de li elektita loĝejo; ŝi prenas lian nomon, kiun ŝi aldonas al la propra en ekonomiaj rilatoj.

La kriminala kodo punas adulton de edzino kaj de edzo. En ambaŭ kazoj la kulpul/in/o estas procesata nur sekve de plendo de la ofendito, sed la konduto de edzo estas konsiderata krima nur se li akceptis la kunadultinon en la geedza loĝejo, aŭ aliloke rimarkeble.

3. Proprietaj rilatoj. La plej granda parto de geedzoj konservas apartan proprieton de respektivaj havaĵoj kaj de la akirintaĵoj dum la geedza rilato. Ĉiu el ili rajtas administri kaj uzi siajn havaĵojn. La leĝo fiksas regulojn sekvendajn kiam la geedzoj intencas starigi familian propraĵon aŭ kiam la edzino alportas doton: la havaĵoj estas ligitaj al la geedza rilato kaj, poste, ĝis plenaĝo de la filoj; por la familiaj bezonoj oni devas uzi la devenaj fruktoj. Oni povas vendi la propraĵojn laŭ permesu decido de la tribunalo.

4. Heredaj rajtoj. Leĝo ordonas ke, se unu el la geedzoj mortas, la alia ricevas parton de lia propraĵo: se la mortinta testamentis, la postvivanto rajtas ricevi fruktuzon sur du trionoj de la propraĵo, aŭ malpli se estas aliaj heredantoj. Se la mortinto ne testamentis, leĝo fiksas propraĵan kvoton por la postvivanto: de triono, se estas pli ol unu filoj heredantoj, ĝis la tuto, se ne estas parencoj ĝis la kvara grado.

5. Rajtoj kaj devoj pri la vivtenado de la familio. Laŭ la civila kodo, edzo estas la estro de la familio, Li devas protekti la edzinon kaj zorgi pri ŝiaj necesaĵoj proporcie al siaj havaĵoj. Edzino devas kontribui, se necese, subteni la edzon.

Estas devo de ambaŭ geedzoj zorgi por subteni, eduki kaj instrui la infanojn, laŭ moralaj principoj, kaj proporcie al la respektivaj havaĵoj.

6. Rilatoj inter la gepatroj kaj infanoj. Kiu naskiĝas de la edzino estas konsiderata filo de la edzo. La edzo nur en kelkaj fiksitaj kazoj rajtas malrekoni sian patrecon. Ambaŭ gepatroj havas patran povon pri edukado de la filoj ĝis ilia 21-jara aĝo; kaj koncernan respondecon. Tiu povo estas plenumata de la patro kaj, se li ne povas aŭ malĉeestas, de la patrino.

La patro reprezentas la filojn en juraj aktoj kaj administras iliajn propraĵojn; tiu rajto estas de la parrino se la patro mortis aŭ se li malzorgas sian devon, certigite de juĝista decido.

Filoj jam 18-jaraj plenrajtas laborkontrakti.

7. Eksedziĝo aŭ separo. En Italio ne ekzistas eksedziĝo /tamen oni diskutas pri tio/. Okazas nur separo, aŭ per interkonsento de la geedzoj aŭ per decido de tribunalo, kiam estas certigitaj kaŭzoj, inter alie: adulto, forlaso, ekscesoj, kruelaĵoj, minacoj, ofendoj.

La juĝista decido rilatas ankaŭ la kondiĉojn de la filoj laŭ iliaj interesoj kaj la monajn devojn de la edzo, laŭ bezonoj de la edzino kaj grado de ŝia kulpo.

8. Jura evoluo. La Konstitucio de la itala Respubliko, aprobita en decembro 1947, asertas inter alie: ĉiuj civitanoj havas samajn rajtojn antaŭ la leĝo, sen distingo pro sekso, raso, lingvo, religio, politikaj opinioj, personaj kaj sociaj kondiĉoj; estas rekonataj la rajtoj de la familio, kiel natura societo bazita sur geedziĝo; geedziĝo estas organizata sur morala kaj jura egaleco de la geedzoj kun la limoj leĝe fiksitaj, kiuj garantias familian unuecon; la geedzoj rajtas kaj devas zorgi pri la filoj: ke la filoj naskiĝintaj ekster la geedziĝa rilato estas jure kaj socie protektataj.

Por forigi dubojn pri aplikado de la konstitucia principo pri egalrajteco de virinoj kaj de viroj, oni aprobis, en februaro 1963, leĝon kiu rajtigas virinojn atingi ĉiujn publikajn oficojn kaj profesiojn.

Pri la familiaj rilatoj estas prezentitaj leĝ-proponoj ĉe la Parlamento por modifi laŭnecese civilan kaj kriminalan leĝon kaj efektivigi tiujn principojn, kiujn tamen ĝenerale la homoj sentas kaj aplikas.

Mi ne povas raporti pri tiuj projektoj, sed mi deziras aldoni mian penson. Egalrajteco de seksoj estas grava kaj granda atingo de la socio, kiu rekonas justan dignecon de la virinoj, sed oni ne devas forlasi la fundamentan funkciadon de virino kiu estas kaj devas esti patrino: en libera kaj elkora interkonsento de la geedzoj, estas la patrino kiu edukas kaj gvidas la infanojn kaj multege influas sur ilia animo por formi homojn preparitajn kun moralaj sentoj por la nova socio. Estas, do necese ke en ekvilibra agado inter la socia kaj la familia medioj la virinoj ne forgesu ilian plej gravan taskon,kaj la ŝtato valorigu tiurilate ilian forton.

Dro Umberto Stoppoloni
- Italio -

## LA PRINCIPO DE EGALRAJTECO DE SEKSOJ EN LA FAMILIA JURO DE SOVETUNIO KAJ JUGOSLAVIO.

/Resumo/

Antaŭ la Oktobra Revolucio <u>en Ruslando</u> estis rekonita nur la eklezia geedziĝo. La dekretoj de la 18-a kaj 19-a de decembro 1917 enkondukis civilan geedziĝon. Post la kodo de 1918, kiu rekonis nur la registritan geedziĝon, la kodo de la 19-a de novembro 1926 egaligis la faktan kunvivadon, aŭ faktan geedziĝon, kun la registrita, sed en 1944 denove estis enkondukita la principo, ke nur registrita geedziĝo estas jure valida. La kodo de 1926, kune kun la postaj amendoj, precipe tiuj de julio 1944 kaj decembro 1965, estas ankaŭ nun valida sur la teritorio de la Rusa SFSR. Esence la samaj juraj principoj regas la familiajn kodojn de la aliaj sovetaj respublikoj. <u>En Jugoslavio</u> antaŭ la milito ekzistis 6 juraj teritorioj rilate geedziĝon. En kelkaj regionoj estis rekonita la civila geedziĝo, sed en la pli granda parto de la teritorio validis la kanona juro de la katolika eklezio, la Geedziĝa Regularo de la ortodoksa serba eklezio kaj la islama juro, kiu permesadis poligamion. Post la milito la Konstitucio de 1946 enkondukis la disiĝon de la ŝtato kaj eklezio, kaj rezulte la geedziĝo kaj familiaj rilatoj estis reguligitaj de la ŝtato. Tuj estis enkondukita civila geedziĝo sur la tuta teritorio de Jugoslavio. Dum en S.U.la familiaj rilatoj estas reguligitaj en la Familiaj Kodoj, en Jugoslavio la koncernaj preskriboj troviĝas en la Baza Leĝo pri Geedziĝo de aprilo 1946, Baza Leĝo pri la Rilatoj Inter la Gepatroj kaj Infanoj de decembro 1947, Baza Leĝo pri Kuratoreco de la sama jaro kaj Baza Leĝo pri Adopto. La heredaj rajtoj en la kadro de la familio estas reguligitaj en S.U. en la novaj civilaj kodoj,dum en Jugoslavio ilin reguligas la Leĝo pri Heredado de 1955.

En ambaŭ landoj la egaleco de seksoj estas jure rekonita kaj garantiita, kvankam la grado de egaleco kaj el jura vidpunkto kaj en la praktiko ne estas tute sama en la du landoj. La principo de egaleco manifestiĝas en la sekvantaj punktoj:

1. <u>Kondiĉoj.</u> - La ĉefa kondiĉo estas la libera volo de la geedziĝontoj,

kiuj devas esti plenaĝaj, nome minimume 18-jaraj. En kelkaj sovetaj respublikoj /Ukrainio, Azerbajdĵano, Gruzio, Armenio kaj Moldavio/ la minimuma aĝo por virinoj estas 16 jaroj. En RSFSR la lokaj sovetoj povas malaltigi je maksimume unu jaro la preskribitan aĝon por virinoj. En Belorusio la preskribita aĝo povas esti malaltigita je 2 jaroj por ambaŭ seksoj. En Jugoslavio la kortumo rajtas malaltigi la aĝon, sen limo, por ambaŭ seksoj ĉu antaŭ ĉu, en kelkaj kazoj, post la kontraktita geedziĝo. La konsento de la gepatroj estas necesa nek en S.U. nek en J. Rilate la ĉefajn impedimentojn, sanga rilato en rekta linio prezentas absolutan malpermeson. En Soveta Unio geedziĝo inter parencoj de la dua grado, inkluzive duongefratojn, estas malpermesita. En Jugoslavio la malpermeso iras ĝis la kvara grado inkluzive /gekuzoj/, sed parencoj de la kvara grado povas esti liberigitaj per decido de la kortumo. En Jugoslavio relativaj impedimentoj estas ankaŭ boparenceco de unua grado kaj rilatoj kreitaj per adopto inter la adoptinto kaj adoptito. Pluaj absolutaj impedimentoj estas: ekzistanta antaŭa geedziĝo, mensa malsano aŭ malkapablo kompreni, ĉio por ambaŭ seksoj egale.

2. <u>Personaj rilatoj.</u> - Egaleco kompleta. La geedzoj rajtas preni kiel komunan nomon familian tiun de la edzo /en S.U. ankaŭ tiun de la edzino/, sed ili rajtas konservi sian familian nomon. Se la nomo estas komuna, la infanoj havas la saman. Se ne, la gepatroj interkonsente donas la nomon al la infanoj; se ili ne konsentas, decidas la kuratora aŭtoritato. La geedzoj komune decidas pri la loko de loĝado. Nek la edzo nek la edzino estas jure devigitaj sekvi la alian partion en lia aŭ ŝia loĝloko. Ĉiu partio konservas sian ŝtatanecon en kazo de internacia geedziĝo.

3. <u>Proprietaj rilatoj</u>. - La geedzoj interkonsente decidas pri la familia mastrumado, sed ili estas sendependaj rilate la elekton de siaj respektivaj okupo aŭ profesio. Ĉiu el la geedzoj konservas la proprietajn rajtojn rilate la havaĵon akiritan antaŭ la geedziĝo. Tiun proprieton ĉiu el la partioj administras sendepende kaj pri ĝi libere disponas. Male, la proprieto akirita dum la geedzeco - kun la escepto de donacoj aŭ heredaĵoj faritaj eksplicite al unu el ili - estas ilia komuna proprieto. Ĉefe tio estas proprieto akirita per laboro. La hejma laboro estas konsiderata kiel enspeza laboro. Tio estas precipe grava en kazo de malkonsento, ĉar la kortumo devas preni en konsideron ankaŭ la hejman laboron de unu aŭ de ambaŭ partioj per fiksi la parton de la komuna proprieto apartamentan al ĉiu el ili. Ambaŭ geedzoj respondecas por la ŝuldoj faritaj de kiu ajn el ili koncerne la familian mastrumadon dum la geedzeco.

4. <u>Vivtenado de la familio.</u> - La geedzoj kontribuas al la vivtenado de la familio konforme al siaj kapabloj. Se unu el la geedzoj ne disponas pri propraj vivrimedoj kaj ne estas laborkapabla, la alia devas vivteni lin aŭ ŝin, kondiĉe ke ties rimedoj ebligas tion. Ĉiaspecaj kontraktoj inter edzo kaj edzino estas permesitaj, se ili ne kontraŭdiras la imperativajn preskribojn de la leĝo, nome tiujn, kiuj rilatas al la principo de egaleco, iliaj reciprokaj rajtoj kaj devoj, la libera elekto de okupo, la reguloj koncerne la komunan kaj apartan proprietojn kaj la devon de vivtenado de la partio, kiu ne havas vivrimedojn kaj ne estas laborkapabla.

5. <u>Rilatoj inter gepatroj kaj infanoj.</u> - La gepatroj havas la samajn rajtojn kaj devojn koncerne la infanojn. La gepatroj devas vivteni la infanojn kaj zorgi pri ilia edukado konforme al la leĝo kaj la eblecoj de la familio.Tio

koncernas la infanojn naskitajn dum la geedzeco, legitimitajn per posta geedziĝi kaj adoptitajn. En Jugoslavio tio koncernas ankaŭ la infanojn naskitajn ekster geedzeco. En S.U. tiurilate la principo de egaleco estas grava rompita. En S.U. la patrino, nek la infano, nek la kuratora aŭtoritato nek kiu ajn alia povas postuli ĉe kortumo aŭ ĉe kiu ajn aŭtoritato la establon de patreco. Sekve, la patro de ekstergeedza infano ne havas kiun ajn rajton aŭ devon rilate tiun infanon, sed pri ĝi zorgas nur la patrino, kiu tamen rajtas ricevi helpon de la ŝtato.

En kazo de nuligo de la geedziĝo aŭ de divorco, la gepatraj rajtoj estas plenumataj de tiu el la gepatroj, ĉe kiu restas la infano laŭ la decido de la kortumo, sed la alia el la gepatroj povas en ĉiu momento peti decidon aŭ de la kortumo aŭ de la kuratora aŭtoritato, se li aŭ ŝi malkonsentas pri iuj agoj de la alia partio rilate la vivtenadon kaj edukadon de la infano.

6. Eksedziĝo. - Geedzeco ĉesas ekzisti aŭ per nuligo ex nunc aŭ per divorco pro kaŭzoj menciitaj en la leĝo, en S.U. implicite kaj en Jugoslavio eksplicite. La kaŭzoj estas la samaj por ambaŭ partioj. En kazo de nuligo de la geedzeco, la infanoj estas konsiderataj kiel laŭleĝaj. Kompreneble, la geedzeco finiĝas ankaŭ per la morto de unu el la partioj. Unu el la kaŭzoj de la divorco estas la neakordigebleco de karekteroj. La aliaj kaŭzoj varias, plej ofte: malfidelco serioze disrompitaj geedzaj rilatoj, nekuracebla mensa malsano, malspero de unu el la partioj por longa tempo, kondamno pro kelkaj gravaj krimoj, inkluzive t.n. politikajn krimojn k.a. Por divorco estas kompetentaj nur la kortumoj en ambaŭ landoj. La divorcita partio, kiu ne havas rimedojn por vivtenado kaj estas nekapabla labori, rajtas ricevi vivtenon de la alia partio. Por la infanoj ili ambaŭ devas kontribui kaj, se unu ne havas rimedojn, la alia devas sola prizorgi la vivtenadon kaj edukadon.

7. Reciprokaj heredaj rajtoj. - En S.U. laŭleĝe heredas en egalaj partoj la postvivinta el la geedzoj, la infanoj kaj la gepatroj. Se neniu el tiu grupo vivas, tiam la gefratoj de la mortinto kaj liaj geavoj, same tiel en egalaj partoj. Infanoj, kiuj ne estas plenaĝaj aŭ kiuj estas labore malkapablaj, same kiel la labore malkapablaj postvivinta el la geedzoj kaj la gepatroj devas en ĉiu okazo heredi almenaŭ 2/3-nojn de tiu parto, kiun ili heredus laŭleĝe,se ne ekzistus testamento /deviga parto/. En Jugoslavio al la unua grupo de laŭleĝaj heredantoj apartenas la infanoj kaj la postvivinta partio en egalaj partoj. Al la dua grupo apartenas la gepatroj de la mortinto, senkonsidere al ilia laborkapablo, kaj la postvivinta partio. En tiu ĉi kazo duono de la proprieto apartenas al la postvivinta en la geedzoj kaj duono al la gepatroj de la mortinto aŭ al iliaj posteŭloj. Fine, se en la momento de la morto troviĝis nek gepatroj, nek gefratoj aŭ iliaj posteŭloj, la tuta heredaĵo apartenas al la postvivinta partio. La t.n. deviga parto en Jugoslavio estas duono de la laŭleĝa.Ĝin rajtas ricevi la infanoj kaj la postvivinta partio.

8. Konkludo. - La fakta situacio ne tute respondas al la formalaj juraj preskriboj. Tio ĉefe ŝuldiĝas al la malpli alta edukiteco de virinoj en ambaŭ landoj, al tradicioj kaj regionaj kutimoj, al la profesioj kaj okupoj de la virinoj, al la virina laboro en la hejmo. Tamen, kompare kun la antaŭa situacio, la principo de egaleco de seksoj faris grandajn progresojn en ambaŭ landoj.

Prof.D-ro Ivo Lapenna

- Britujo -

# LA PRINCIPOJ DE EGALRAJTECO DE SEKSOJ EN LA FAMILIA JURO DE NORVEGUJO

Egaleco de la seksoj estas nuntempe fundamenta principo en la norvega juro. Nur kelkaj leĝoj havas malsamajn regulojn por la du seksoj.

Koncerne la familian juron mi mencias, ke viro kiu havas malpli ol dudek jarojn ne rajtas edziĝi sen konsento de certa oficiulo. La aĝlimo por la virinoj estas tiurilate dekok jaroj. /Leĝo 31/5 1918./ Por ambaŭ validas, ke se ili ne estas plenaĝaj, ili ne povas edziĝi sen konsento de la gepatroj. /§ 2./

Apartan regulon ni havas rilate al virino, kiu frue estis edziniĝita. Ordinare ŝi ne rajtas edziniĝi denove pli frue ol dek monatoj post la fino de la antaŭa edzineco. /§ 10/.

Ĉiuj aliaj reguloj koncerne edzecon, separon kaj eksedziĝon estas la samaj por la du seksoj.

Ni ankaŭ notu, ke la laboro de la edzino en la hejmo kaj la mona kontribuo flanke de la edzo laŭ la leĝo havas la saman gravecon. /Leĝo 20/5 1927 § 1./

Rilate al la heredrajto, seksa diferenco estas ordinare sen influo sur la grandeco de la heredpartoj. Nur laŭ la leĝo pri alodo, kiu ankaŭ havas regulojn pri heredrajto pri bieno, la filo havas pli grandan rajton ol la filino. Ekzemple: se mi posedas bienon kaj havas du infanojn, unu filinon kaj poste unu filon, la lasta fariĝas posedanto de la bieno post mia morto. /Leĝo 26/6 1821 §.11./ Li eĉ transprenas la bienon je favora takso.

T.A. Høeg
- Norvegujo -

# LA PRINCIPO DE EGALRAJTECO DE SEKSOJ EN LA FAMILIA JURO DE POLLANDO

<u>Enkonduko</u>

Nuntempe pola familia juro estas juna, ĉar Pollando estis longe mallibera /ekde 1795 ĝis 1918/ kaj tial en tiu ĉi tempo de la malliberecо regis en Pollando fremdaj juraj sistemoj nome:

1./ en okcidenta kaj en norda Pollando - ekde 1772 germana juro, lasttempe la kodekso civila de 1896,

2./ en orienta Pollando - ekde 1772 rusa juro, lasttempe la kolekto de leĝoj de 1832,

3./ en suda Pollando - ekde 1772 la aŭstria juro, lasttempe la kodekso civila de 1811 kaj hungara leĝo pri edziĝo de 1894,

4./ en centra Pollando - la kodekso civila de Napoleono de 1804 deviga ekde la 1-a de majo 1808.

Nur en centra Pollando ekzistis krome de la kodekso de Napoleono ankaŭ la kodekso civila de Pola Regno de la 1-a /13-a/ de junio 1825 kaj la leĝo pri edziĝo de la 24-a de junio 1836.

Post la liberigo de la lando, en la jaro 1918 la unua konstitucio de la Pola Respubliko de la 17-a de marto 1921 [1/] enkondukis per la artikolo 96-a la principon de egaleco de ĉiuj civitanoj en la juro. La artikolo 95-a deklaris sur

[1/] Jurnalo de la leĝoj la numero 44-a la pozicio 267-a.

la teritorio de la ŝtato kompletan protektadon de la vivo, de la libereco,kaj de la havaĵo por ĉiuj sen diferenco de la deveno, de la nacieco, de la lingvo aŭ de la religio. En tiuj ĉi artikoloj la sekso ne estis nombrita.

Ĝuste la dua konstitucio de la 23-a de aprilo 1936 [1/] enhavis la artikolon 7-an, kiu parolis pri sekso: "Nek deveno, nek konfeso, nek sekso, nek nacieco povas esti kaŭzo de limigo de tiuj ĉi rajtigecoj." Sed tiu ĉi artikolo rilatis al juro publika sed ne al la privata, familia.

Post la liberigo agis en Pollando la komisiono kodifa, [2/] kiu preparis la unuigon de la fremdaj juraj sistemoj kaj ankaŭ la polan juran sistemon. Sed antaŭ la dua mondmilito la laboroj de la kodifa komisiono ne estis finitaj. Pro tio ĉiuj nomitaj fremdaj juraj sistemoj ekzistis ĝis enkonduko de la leĝo pri geedziĝo de la 25-a de septembro 1945 [3/], de la familia leĝo de la 22-a de januaro 1946 [4/] kaj de la leĝo pri havaĵo de la geedziĝo de la 29-a de majo 1946. [5/]

Sed jam post kelkaj jaroj estis enkondukita la nova familia kodekso de la 27-a de junio 1950 [6/], kiu anstataŭis la pli fruajn leĝojn el 1945 kaj 1946. Sed ankaŭ tiu ĉi kodekso ne ekzistis longe: jam la 25-an de februaro 1964 [7/] estis publikigita la nova kodekso familia kaj kuratora, kiu devigis ekde la 1-a januaro 1965.

Mi opinias, ke ne estas necese montri la diferencojn de ĉiuj kodeksoj kaj leĝoj sed sufiĉas, ke mi montru la fundamentojn de la nuntempa kodekso familia kaj kuratora de 1964 jaro.

Kontrakto de geedziĝo. La viro povas edziĝi se li estas dudek unu jarojn aĝa, la virino - se ŝi estas dekok jarojn aĝa.

Tamen pro gravaj kondiĉoj la juĝistaro povas permesi la edziĝon al viro, kiu estas dekok jaraj, aŭ al virino, kiu estas dekses jara aĝa, se la cirkonstancoj rezultas, ke la edziĝo estos bona por la estonta familio kaj por la sociala afero. [8/]

Oni ne povas nuligi la edziĝon pro la manko de aĝo, se la edzo antaŭ la ekprocesado de la plendo atingis la devigan aĝon. Se la edzino estas graveda, nur ŝi povas postuli la nuligon de edziĝo pro la manko de la aĝo. [9/]

Ĉiu de geedzoj povas postuli nuligon de la edziĝo pro la manko de aĝo. [10/]

Ankaŭ ĉiu de geedzoj povas postuli nuligon de la edziĝo pro:

1/ Ĵurnalo de la leĝoj la numero 30-a la pozicio 227-a.
2/ formita per la leĝo de la 3-a de junio 1919.
3/ Ĵurnalo de la leĝoj la numero 48-a la pozicio 270-a.
4/ " " " " " " 6-a " " 52-a.
5/ " " " " " " 31-a " " 196-a.
6/ " " " " " " 34-a " " 308-a.
7/ " " " " " " 9-a " " 59-a.
8/ Art. 10 par. 1
9/ Art. 10 par. 3
10/ Art. 10 par. 2

a/ senigo de la memstara agado,[1/]

b/ mensa malsano aŭ imbecileco,[2/]

c/ proedziga parenceco,[3/]

d/ adopto [4/].

<u>Rajtoj kaj devoj de geedzo.</u> La geedzoj havas la samajn rajtojn kaj devojn dum la edziĝo [5/] kaj decidas komune pri la familiaj aferoj. Se ne estas interkompreniĝo, ĉiu povas turni sin al juĝistaro por ricevi decidon[6/].

La edzino povas konservi sian nomon aŭ aldoni al sia nomo, la nomon de edzo aŭ alpreni la nomo de edzo [7/].

Ambaŭ geedzoj devas kvietigi bezonojn de la familio [8/]. Se unu de la geedzoj ne plenumas siajn devojn, la juĝistaro povas ordoni, ke la salajro de unu de geedzoj devas esti pagota al la dua de geedzoj [9/]. Ambaŭ geedzoj estas respondecaj solidare pro sindevigoj de unu de la geedzoj [10/].

<u>Havaĵaj rilatoj de la geedzoj.</u> Per kontrakto de geedziĝo ekestas la komuneco de la havaĵo, kiu cirkaŭprenas akiraĵon [11/] precipe: aĵoj, kiujn geedzoj aĉetis, salajroj, enspezoj de la komuna havaĵo kaj de la propra havaĵo de ĉiuj de la geedzoj [12/].

Ambaŭ geedzoj estas devigitaj kunlabori en estrado de la komuna havaĵo[13/]. Ĉiu de la geedzoj povas memstare estri la komunan havaĵon. Se la agado estas alia ol ordinara estrado, estas bezonata la konsento de alia de geedzoj [14/]. Se unu de la geedzoj rifuzas konsenton, la dua de la geedzoj povas postuli de la juĝistaro konsenton por la agado [15/].

Juĝistaro povas pro gravaj kondiĉoj senigi la alian de la geedzoj pri estrado de la komuna havaĵo [16/].

Ambaŭ geedzoj havas la samajn partojn en la komuna havaĵo [17/]. Pro gravaj kondiĉoj ĉiu de la geedzoj povas postuli, ke la juĝistaro neniigu la komunecon de la havaĵo [18/].

<u>La ĉesado de la geedziĝo.</u> Ĉiu de la geedzoj povas postuli disedziĝon [19/]. Sed ne estas permesata la disedziĝo, se la postulanto estas kulpa en la disfalo de la kunvivo [20/].

Edzino disedziĝita povas reveni al sia nomo [21/].

Ĉiu de la geedzoj disedziĝita kaj malkulpa povas postuli de la alia monon por la vivtenado, se li/ŝi estas en malriĉeco [22/].

Se unu el la geedzoj estas deklarita kiel ekskluzive kulpa de la disedziĝo kaj la disedziĝo kaŭzas malplibonigon de la materiala situacio de la malkulpa de la geedzoj, juĝistaro povas verdikti, ke la ekskluzive kulpa el la geedzoj pagu al la malkulpa de la geedzoj ankaŭ tiam, kiam li/ŝi ne estas en malriĉeco [23/].

<u>Deveno de la infano.</u> Edzo de la patrino povas plendi por nei la patrecon.[24/]

| | | |
|---|---|---|
| 1/ Art. 11 par. 2 | 2/ Art. 12 par. 2 | 3/ Art. 14 par. 3 |
| 4/ Art. 15 " 2 | 5/ " 23 | 6/ " 24 |
| 7/ " 25 " 1 | 8/ " 27 | 9/ " 28 |
| 10/ " 30 " 1 | 11/ " 31 | 12/ " 32 |
| 13/ " 36 " 1 | 14/ " 36 " 2 | 15/ " 39 |
| 16/ " 40 | 17/ " 43 " 1 | 18/ " 52 " 1 |
| 19/ " 56 " 1 | 20/ " 56 " 3 | 21/ " 59 |
| 22/ " 60 " 1 | 23/ " 60 " 2 | 24/ " 63 |

Patrino povas ankaŭ plendi por nei la patrecon [1], de sia edzo.

Por agnosko de la infano estas bezonata la konsento de patrino [2].

La gepatra povo. Gepatra povo apartenas al ambaŭ gepatroj [3]. Pri aferoj de la infano la gepatroj decidas komune; se ne estas interkonsento, decidas la kuratora juĝistaro. [4]

La gepatroj estas leĝaj reprezentantoj de la infano. Ĉiu de la gepatroj povas agi memstare [5].

La alimenta devo. La gepatroj devas doni alimentojn [6] al la infano. La afero de la servoj dependas de la bezonoj de la infano kaj de eblecoj de la gepatroj [7]. En la verdikto pri disedziĝo, la juĝistaro decidas, en kiu alteco ĉiu de la geedzoj devas kovri elspezojn por vivtenado kaj edukado de infano [8].

Pere de tiu ĉi raporto povas konstati, ke la principo de egaleco de seksoj estas konsekvence trakondukita en la pola familia juro.

Oni povas diri, ke la pola familia juro el 1964 jaro estas moderna kaj progresa.

St. R. Kubiak
advokato
- Pollando -

1/ Art. 69 par 1
2/ Art. 77
3/ Art. 93
4/ " 97 " 2
5/ " 98 par 1
6/ " 133 par. 1
7/ " 135 " 1
8/ " 58

## LA PRINCIPO DE EGALRAJTECO DE SEKSOJ EN LA FAMILIA JURO DE RUMANUJO

Laŭ leĝo nr.4 de 4.I.1954, modifigita per la leĝo nr.4 de 4-IV.-1956,nia ŝtato, la Socialisma Respubliko Rumanio protektas la geedziĝon kaj la familion kaj defendas la interesojn de l'patrino kaj de l'infano.

Ĉe bazo de la familio estas la geedziĝo libere konsentita de la geedziĝontoj.

Artikolo 1 de nia familia kodo proklamas ke en la geedzaj rilatoj kiel ankaŭ rilate al siaj infanoj, la viro kaj virino estas egalrajtaj.

Ankaŭ art.83 de nia konstitucio proklamas la plenan egalecon de la viro kaj virino en ĉiuj fakoj de la ekonomia, politika, ŝtata kaj kultura vivoj.Ĉi-tiu principo de egaleco inter viro kaj virino estas bildigo de la interdependeco kiu ekzistas inter la situacio de la virino en nia socio kaj tiu kiun oni kreis al ŝi en la familio.

1./ Kondiĉoj por geedziĝo: aĝo, konsento, impedimentoj. Nia familia kodo ne donas apartan difinon de la geedziĝo, sed laŭ artikoloj 1 kaj 3 de nia kodo rezultas ke la geedziĝo estas unuiĝo libere konsentita inter viro kaj virino, solenmaniere konkludita, respektante la leĝajn postulojn je celo starigi familion.

El tiu-ĉi difino rezultas vico da gravaj trajtoj de la geedziĝo.

Estante unuiĝo laŭleĝe ordigita kaj ne laŭ kontrakto, ĝiaj efikoj ne estas fiksitaj de la geedzoj, sed laŭleĝe. La geedziĝo, do, ne povas esti disigita de la geedzoj per sia nura interkonsento kaj ankaŭ ne povas esti submetita al iuj ajn kondiĉoj.

La libera interkonsento de la geedzoj igas la aprobon fare de la gepatroj nenecesan. Tio ekskludas la ekspluatadon de la virino, fakto tion ofte renkontita en la burĝa societo.

Laŭ art.4 de nia familia kodo, la viro je 18-jaraĝo kaj la virino je 16-jaraĝo povas jam geedziĝi. Ĉi-tiuj aĝoj estis fiksitaj konsidere la seksan,psikan kaj moralan naturecon de la estontaj geedzoj. Escepte, surbaze de kuracista avizo kaj aprobo de la ĉefurbaj /aŭ regionaj/ urbodomaj instancoj, sur kies teritorio loĝas la virino, ŝi povas esti permesata geedziĝi je aĝo de 15 jaroj.

<u>La impedimentoj</u> al la geedziĝoj povas esti duspecaj: absolutaj kaj relativaj. Ekzemple: Ekzistado de parenceco en malpermesata grado, manko de publikeco kaj soleneco, manko de rajtigo por la geedziĝo kun aliŝtata civitano, estas absolutaj impedimentoj.

La relativaj nulecoj rilatas ĝenerale al manko de konsento, flanke de la geedzoj.

La nuleco de la geedziĝo devas esti konstatata pere de juĝista verdikto.

Inter la absoluta kaj relativa nulecoj ekzistas ĝis certa punkto diferencoj, pro tio ke la absoluta nuleco protektas ĝeneralajn, objektivajn, sociajn interesojn, dum la relativa nuleco protektas subjektivajn, individuajn interesojn. Tamen, en kio koncernas la efikojn praktikajn, inter ĉi-du nulecoj ekzistas neniu direrenco, sekve, la absoluta nuleco samkiel la relativa nuligas la geedziĝon ankaŭ por la pasinteco, restante sen konsekvencoj por la infanoj kiuj ĝuos la juran reĝimon de infanoj devenantaj el geedziĝo disigita pere de eksedziĝo.

<u>2./ Personaj rilatoj.</u> La personaj rajtoj kaj devoj de la geedzoj rezultas el la plena egaleco en rajtoj kaj devoj de tiuj-ĉi, dum la geedziĝo. La geedzoj povas decidi en ĉio, kio koncernas la geedziĝon.

Ĉe konkludo de la geedziĝo, la geedzoj povas elekti siajn nomojn laŭ siaj interkonsentoj, ĉu gardante ĉiu el ili siajn malnovajn nomojn, ĉu adoptante la nomon de unu el ili, ĉu ambaŭ nomojn kunmetitajn. Ili esas devigataj dum la geedziĝo porti la nomon deklaritan ĉe konkludo de la geedziĝo.

Interkonsente, la geedzoj decidas ankaŭ rilate al sia loĝloko. Principe, la ŝanĝo de la loĝloko de unu edzo ne devigas nepre unu sekvi la alian. Tiurilate ekzistas plena egaleco, sed la kondiĉo de sama familia vivo estas, ke la geedzoj vivu kune.

Ambaŭ geedzoj ĝuas plenan liberecon elekti laŭplaĉe sian okupon aŭ profesion kaj konkludi ĉiun ajn kontrakton laŭlegan.

<u>3./ Proprietaj rilatoj /Aparta kaj komuna proprieto de la geedzoj/.</u> La geedzoj estas devigataj kontribui al la geedziĝaj elspezoj je mezuro de ĉies rimedoj. La aĵoj akiritaj dum la geedziĝo estas de 'l momento de ĝia akiro komunaj aĵoj de la geedzoj.

Ne estas komunaj aĵoj, sed propraj aĵoj de ĉiu ajn edzo, jenaj:

1./ La aĵoj akiritaj antaŭ la konkludo de la geedziĝo;

2./ La aĵoj akiritaj dum la geedziĝo pere de heredaĵo, heredo-donaco aŭ donaco, escepte se la disponiginto decidis ke tiuj aĵoj estu komunaj;

a/ La aĵoj de persona uzo necesaj por praktiki sian profesion;

b/ La sumoj kiel premioj aŭ rekompencoj akiritaj, sciencaj aŭ literaturaj manuskriptoj, eltrovoj kaj novigoj kaj aliaj similaĵoj.

Konsekvenco de tiuj ĉi principoj estas, ke la geedzoj respondecas 1/ por la ŝuldoj komune kontraktitaj;

2/ por la ŝuldoj kontraktitaj de la geedzoj je plenumigo de la ordinaraj ĉiutagaj bezonoj de la geedziĝo;

3/ por kompensi la perdojn kaŭzitajn de unu el la geedzoj al la socialisma propraĵo, se per tia agado la komuna geedza havaĵo plimultiĝis.

La komunaj aĵoj ne povas esti persekutataj de persona kreditoro de unu de la geedzoj.

Tamen, post persekuto de la propraj posedaĵoj de la ŝuldanta edzo, lia persona kreditoro povas peti la disigon de la komunaj aĵoj, sed nur en mezuro necesa por kovri sian monpretendon.

4./ Rajtoj kaj devoj rilate la vivtenadon de la familio. Laŭ principo de la egaleco de la seksoj, la geedzoj estas devigataj kontribui, laŭ siaj rimedoj, al la elspezoj de la geedziĝo.

Reciprokajn devojn rilate vivtenadon ekzistas inter edzo kaj edzino, gepatroj kaj infanoj, inter la adoptanto kaj la adoptito inter geavoj kaj nepoj, praavoj kaj pranepoj, fratoj kaj fratinoj samkiel inter aliaj personoj antaŭvidataj de la leĝo.

Inter ĉiuj kategorioj kiuj ŝuldas al si reciprokan vivtenadon, unuavice ŝuldas al si tion la geedzoj.

5./ Rilatoj inter gepatroj kaj infanoj. En kio koncernas la rilatojn inter gepatroj kaj infanoj, la leĝdonanto eliris de la ideo starigi firmajn rilatojn surbaze de amo kaj respekto inter gepatroj kaj infanoj kaj de la neceso, protekti la familion kaj la apartajn interesojn de la infanoj.

La koncernaj juraj normoj ampleksas la rajton kaj la devon de la gepatroj eduki siajn infanojn, protekti, defendi kaj reprezenti ties interesojn, personajn kaj monajn rilatojn inter gepatroj kaj infanoj kaj perdon de la gepatraj rajtoj.

Laŭ art.1 de nia kodo, la gepatraj rajtoj povas esti uzataj nur je intereso de la infanaro.

La progresema karaktero de nia familia juro evidentiĝas ambaŭ el tio, ke ĝi ne faras diferencon inter la infanoj naskiĝintaj en la geedziĝo kaj kiuj naskiĝis ekster la geedziĝo. La lastaj ĝuas absolute la sama juran staton.

6./ Eksedziĝo /Kaŭzoj, divido de la proprietaĵoj, rajtoj de la senkulpa partio. Laŭ reguloj de nia familia kodo, la geedziĝo ĉesas sekve de la morto de unu de la geedzoj, per juĝista deklaro de la morto de unu de la geedzoj kaj per eksedziĝo.

En tio kio koncernas la eksedziĝon, nia kodo ne indikas kaŭzojn kondukantajn al la eksedziĝo kiel en la sistemo de la civila kodo kiu ĉe mi ne plu validas. Laŭ nuna sistemo, ni trovas en la kodo nur ĝeneralajn direktivojn por solvo de la eksedziĝ-problemo. La sola kriterio estas la neceso kaj oportuneco de la eksedziĝo sekve de fortaj kaj seriozaj motivoj kiuj neebligas la daŭrigon de la geedziĝo per tiu kiu demandas la eksedziĝon.

En tiu-ĉi sistemo la juĝistaj instancoj havas tre larĝan liberecon decidi, kun plena respondeco, pri neceso kaj oportuneco de eksedziĝo. Ĉar la vivo estas tro kompleksa kaj multflanka, nia leĝdoninta preferis ĉi-tiun sistemon. Do, la juĝistaj instancoj permesas la eksedziĝon nur kiam ili alvenis al la konvinko ke daŭrigo de kunvivado de la geedzoj estas vere neeble.

La efikoj de la eksedziĝo.

a/ En tio kio koncernas la personon de la geedzoj.

1. Ĉesas la geedziĝo, sed la eksedziĝintaj edzoj povas regeedziĝi.

2. Ili reprenas la nomon de antaŭ la geedziĝo.

b/ En tio kio koncernas la havaĵon de la geedzoj:

a/ Ĉesas la hereda vokeco inter la geedzoj.

b/ La komunaj posedaĵoj estas diskonataj inter la geedzoj ĉu laŭ sia interkonsento, ĉu laŭ decido de la juĝista instanco se la geedzoj ne akordas.

Post definitiva restado de la eksedziĝa verdikto la eksedziĝinta parto estas rajtigita ricevi de la alia parto rimedojn por sia vivtenado, se li mankas vivrimedojn sekve de nelaborkapablo okazinta antaŭ la geedziĝo, dum la geedziĝo aŭ dum unu jaro post la eksedziĝo sekve de okazaĵo ligita je la geedziĝo.

La kulpa parto ĝuas vivtenadon nur unu jaron ekde la eksedziĝo. La rajto je vivtenado ĉesas per regeedziĝo de la parto rajtigita ricevi vivtenadon.

Se la geedzoj ne decidas alie, la lukontrakton profitas la parto al kies zorgo oni konfidis la infanojn. Kiam ne ekzistas infanoj, ĝin profitas la parto je kies favoro oni donis la eksedziĝ-verdikton.

c/ En tio kio koncernas la infanojn.

Ĝenerale, la neplenkreskaj infanoj estas konfidataj al la senkulpa edzo. Tamen, se la interesoj de la infanoj ĝin postulas, la infanoj povas esti konfidataj ankaŭ al la alia edzo /ekzemple, nur kelkmonata infano estas konfidata al la patrino/.

La infanoj povas esti konfidataj ankaŭ al parencoj aŭ /kun konsento de la gepatroj/, al fremdaj personoj aŭ al protektaj institucioj.

La juĝista instanco fiksas ankaŭ la monan kontribuon de la gepatroj je vivtenado, eduko, instruado kaj profesia pretiĝo de la infanoj.

La edzo eksedziĝinta aŭ la personoj al kiuj oni konfidis la infanojn, gardas la gepatrajn rajtojn. La edzo al kiu oni ne konfidis la infanojn, gardas la rajton kontakti kun ili kaj observi, ĉu ĉio estas en ordo en kio koncernas ilian vivtenadon, edukadon, k.t.p.

Principe, la infanoj estas konfidataj konsiderante siajn interesojn.

En ĉiuj kazoj la zorganta aŭtoritato estas devigata kontroli kiamaniere estas respektataj la dispozicioj de la familia kodo.

7./ Laŭleĝaj heredaj rajtoj inter la geedzoj.

Nia leĝdoninta dividis la personojn kiuj havas heredajn rajtojn en 4 klasojn.

1/-La klaso de la idoj ampleksas la infanojn naskiĝintajn dum la geedziĝo, ekster la geedziĝo, kaj la infanojn filigitajn, samkiel ties idojn /nepoj, pranepoj/.- k.t.p.

2/-La miksita klaso de la privilegiaj antaŭestintoj kaj de la privilegiaj apudflankuloj.-

Tiuj-ĉi estas la patro kaj la patrino de "cujus", la privilegiaj apudflankuloj estas la fratoj kaj la fratinoj de tiu-ĉi.

3/-La klaso de la ordinaraj antaŭestintoj estas la avoj kaj la praavoj, k.t.p.

4/-La klaso de la ordinaraj apudflankuloj estas la onkloj, onklinoj kaj unugradaj kuzoj.

La heredaj rajtoj de la postvivinta edzo /edzino/.

Krom la parencoj el ĉi-tiuj 4 klasoj ĝuas ĉiam heredajn rajtojn la postvivinta edzo aŭ edzino.

La etendo de ties rajto dependas de la klaso al kiu apartenas la parencoj kun kiuj konkuradas la postvivinta edzo /aŭ edzino/.-

Tio estas de:

a/ 1/4 en konkurado kun la idoj,

b/ 1/3 en konkurado kun la patro kaj la patrino de l'mortinto aŭ nur kun unu el ili; en ambaŭ kazoj kune kun la fratoj kaj fratinoj de l'forpasinta edzo kaj ties idoj, aŭ nur kun unu el ili;

c/ 1/2 kiam li /aŭ ŝi/ konkuradas nur kun la patro kaj patrino de l'forpasinto aŭ nur kun unu el ili, aŭ nur kun liaj fratoj kaj fratinoj kaj ties idoj aŭ nur kun kelkaj el ili;

d/ 3/4 kiam li /aŭ ŝi/ konkuradas kun la aliaj antaŭestintoj aŭ apudflankuloj ĝis la 4-a grado inkluzive /unugradaj kuzoj/

Plie, se la forpasinto ne havis parencojn ĝis la 4-a grado inkluzive,la tuta heredaĵo revenas al la edzo /edzino/ postvivinta.

En kazo ke la geedziĝo estas nuligita, nur la edzo kiu ĉe ĝia konkludo estis de sincera fido, gardas ĝis definitiva restado de la verdikto situacion de edzo el valida geedziĝo. Nur tiu gardas vokecon je heredaĵo de la alia edzo, kompreneble se la heredaĵo estis malfermita antaŭ ol la nuliga verdikto iĝis definitiva.-

La edzo de malsincera fido, perdinte la kvaliton de edzo sekve de nuligo de la geedziĝo, perdas samtempe la rajton al la heredaĵo de la alia edzo.

El ĉi-tiuj kelkaj principoj de nia familia juro supre elmontritaj oni povas prave konkludi ke nia socia ordo kiu luktadas por forigo de ĉiu ekspluatado de l'homo pere de homo, kreas seriozajn garantiojn por plifortigi la familion kaj certigi la plenan egalecon inter viro kaj virino en ĉiuj regionoj de nia socia, kultura kaj ekonomia vivo.

Prof. Doni Vernescu
- Rumanujo -

Redaktora noto

Bonvolu priatenti, ke

- ĉiuj artikoloj devas esti tajpitaj, aŭ skribitaj per bone desegnitaj literoj, nigrakolore, sur blanka papero de formato internacia A 4., nur sur unu flanko de la folioj kaj kun sufiĉa marĝeno,

- preferinde sendu 2 ekzemplerojn de viaj artikoloj, kaj evitu tro longajn dokumentojn.

La redaktoro ne povas garantii publikon de la artikoloj, kiuj ne respektas tiujn direktivojn aŭ ne estas en korekta en Esperanto.

Redakcio: je propra nomo de la redaktoro
Szemere u. 10., Budapest V. Hungarujo

Administrado: Jurista Sekcio de Hungara Esperanto-Asocio
Kenyérmező u. 6., Budapest VIII.

Presejo: KPM.I.G.H., Fk: Sáros Jenő, Fv. Magyar István
Eng: III/400/3/179/Bp/1967. 500 pld.